


1986 novembro  
79a jaro  
n-ro 971 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Literatura  
numero



# Vi trovos,

kiel jam atentigus vin la apudapaĝa foto, ke granda parto de la sekvantaj paĝoj ŝuldiĝas al la kunlaboro de gastredaktoro. Fakte, d-ro Vilmos Benczik, konata hungara kritikisto, redaktoro kaj senlaca fleganto de la Esperanta beletro, superplenumis siajn promesojn ĉirilate. Tiel la literatura ono de ĉi tiu numero trioble superas la ceteran; iom kompanse, ni ankaŭ ĉi-numere prezentas kalendaron por la unuaj monatoj de la Jubilea Jaro, kaj la unuan Kongresan Komunikon pri la 72a UK en Varsovio.

Ni esperas, ke inter la literaturaj eroj ĉi tie prezentitaj troviĝas io por ĉies gusto. La verkoj ja gamas laŭ stilo kaj enhavo; kompreneble, la redaktoroj respondecas pri nek unu nek la alia. Finfine, vario kaj libero en verkado — kaj publikigado — estas nepraj kondiĉoj por la evoluo kaj tutmondiĝo de nia internacia kulturo.

## Enhavo

- 181 Senordaj pensoj pri la Esperanta beletro (V. Benczik)
- 182 Belartaj Konkursoj 1987: Alvoko kun reguloj
- 183 Internacia Literatura Forumo
  - Ĉenintervjuo kun verkistoj: Kiel fartas nia beletro?
- 185 Belartaj Konkursoj 1986: Adoro (A. Goodheir)
- 186 Manpleno de hodiaŭa poezio: Lumo sur dolmeno (A. Goodheir), Binoklo (M. Ternavski), Soneto al sonato (G. Gazizov), Heredaĵo (I. Szabó), Neĝo (B. Ragnarsson), Temposmozo (E. de Kock), Kalvario (O. Kníchal)
- 188 Omaĝe al Majo (Miyamoto masao)
- 189 Fragmentoj pri la infanaĝo (S. Štimec)
- 191 La tagoj de la senfina tempo (I. Nemere)
- 194 Ordeno de Verkistoj; fragmentoj el romano (K. Pić)
- 195 Laste aperis... (eldonaĵoj en aŭ pri Internacia Lingvo)
- 196 Kongresa Komunikado de la 72a UK en Varsovio
- 197 Kalendaro de Esperanto-renkontiĝoj
- 198 Loke — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 200 Anoncetoj; Nekrologoj

## La kovrilo

Ĉu ne invita, tiu altbretara, multvoluma, iom polveca biblioteko? Per tiu ĉi numero — kiu devus atingi vin ne tro longe post la Tago de la Esperanta Libro la 15a de decembro — ankaŭ ni volas inviti vin libere promenadi, vagadi tra la koridoroj de Esperantaj librotekoj. Post kiam vi trafolumis ĝiajn paĝojn, nu, kial ne ankaŭ iom foliumi viajn ĉekojn kaj monbiletojn?.... Laŭ la vortoj de unu el niaj intervjuitoj, pleje mankas al nia literaturo "dek mil senlacaj kaj aĉetemaj legantoj". Ĉu ni persvados vin aliĝi?

## esperanto

**Oficiala organo** de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Telefono:** (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

**Telekso:** 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

**Aperas** monate (escepte de aŭgusto).

**Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata** en **105 landoj**. Voĉlegata por blinduloj.

**Redaktas:** O. Buller kaj M. Fettes.

**Abonprezo** varias laŭlande (Gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

**Anonctarifo (gld.):** 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%.

Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Banko:** Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

**Ned. poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

## Estraro de UEA

**Prezidanto** (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.

**Vicprezidanto** (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

**Vicprezidanto** (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

**Ĝenerala sekretario** (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

**Estrarano** (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; tel. (1) 42 37 14 73.

**Estrarano** (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung. tel. (1) 316-423.

**Estrarano** (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio. (583) 570 66.

**Estrarano** (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonselaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.

**Estrarano** (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

# La Esperanta literaturo en sia centa jaro

## Senordaj pensoj pri la Esperanta beletro



Forpasis centjaro minus kelkaj monatoj depost ti-  
am, ke en broŝureto enhavanta la kernan vortaron  
kaj bazajn gramatikajn regulojn de planlingvo, an-  
koraŭ parolata nur de la aŭtoro, aperis ankaŭ du  
originalaj poemoj, verkitaj en tiu lingvoprojekto.

En tiu momento *Ho, mia kor'* kaj *Mia penso* —  
ĉar temas pri tiuj poemoj, depost tiu tempo legitaj  
certe de milionoj — estis nenio alia ol ia arbitra sin-  
sekvo de literoj; sencon kaj sentojn ili enhavis nur  
por la aŭtoro mem. Estis tute aperta la demando, ĉu  
iam ili ekhavis sencon kaj sentojn ankaŭ por aliaj.

Tiu demando dum tre mallonga tempo ricevis  
respondon. Ne nur per tio, ke la planlingvon ekler-  
nis areto da homoj, ja tiu fakto ne nepre signifus  
aprobon de la aŭtoro romantikemo verki poemojn  
en ĝi; sed ĉefe per tio, ke la verkado kaj legado de  
beletro tre baldaŭ fariĝis la ĉefa formo de la altgrada  
aplikado de la lingvo.

Kaj tio estis natura, evidenta evoluo de la afero,  
malgraŭ ke multaj esperantistoj ĝis nun havas prin-  
cipajn argumentojn kontraŭ la literatura aplikado  
de Esperanto. Sed la lingvo bezonis kaj daŭre bezo-  
nas la beletron, ja beletro laŭ ĉiuj opinioj estas rigar-  
data la kulmino de la aplikado de lingvo — kaj ĝi

tiu lingvo, do ĝi tamen devas esti pli ol seka artefari-  
ta kodaro."

El la vidpunkto de la lingvoevoluo la rolo de la be-  
leto estas evidenta: ĝi estas la plej kompleksa formo  
de la lingvouzado, ja beletra teksto enhavas potenci-  
ale ĉiujn eblajn stil-tavolojn de la lingvo, inkluzive  
la faklingvojn. Tial la ampleksa beletra uzado plej  
komplekse evoluigas la *tutan* lingvon.

Ne estas senutile noti ankaŭ tiun fakton, ke poten-  
ciala "konsumanto" de beleto estas la tuta  
lingvokomunumo: dum fakan literaturon — eĉ  
sciencpopularigan — legas nur homoj havantaj inte-  
reson kaj bazajn konojn pri la koncerna fako, bele-  
tron povas legi principe ĉiuj.

Esperantistoj vivas diaspore en la tuta mondo: la  
uzado de la lingvo por la plej multaj el ni signifas  
grandparte legadon kaj skribadon. En tia situacio  
niaj legaĵoj flegas kaj evoluigas nian lingvoscion.


Eblus senfine vicigi la argumentojn kaj pruvojn  
pri la absoluta neceseco de beleto en Esperanto. Ta-  
men, la plej evidenta argumento kaj pruvo estas tio,  
ke la Esperanta beleto *ekzistas*.

Sed kia ĝi estas? Pli precize: kia estas la beleto,  
verkita originale en Esperanto? Kiel staras la afero  
koncerne la "atingon de la nivelo de la nacilingvaj  
beletoj"? Ĉu ni jam atingis ĝin? Ĉu ne?

La demando estas praktike nerespondebla, kaj ne  
nur pro tio, ke nivelon oni ne mezuras per metro aŭ  
litro. Multe pli tial, ke ĉiu kultura kreaĵo estas fidin-  
de ekzaminebla nur en tiu komunumo, en kiu ĝi  
estis kreita. Per tio mi ne volas nei la ekziston de uni-  
versalaj valorkriterioj, nur intencas atentigi pri la  
fakto, ke tiuj kriterioj necese preteratentas aron da  
facetoj, kiuj enhavas specifan mesaĝon nur por la  
membroj de la komunumo, en kiu la verko kreiĝis.  
Ofte aŭdeblas la plaĉa, sed esence tre nelojala  
deklaro: "Mi pretas legi en Esperanto nur tion, kion  
mi legus ankaŭ en mia nacia lingvo." Tiu deklaro lo-  
gike estas daŭrigebla jene: "Mi pretas legi nur tiajn  
verkojn de mia nacia literaturo, kiuj atingas la nive-  
lon de la plej bonaj verkoj de la mondliteraturo."  
Estas evidente, ke tio signifus konscian rezignon pri  
signifa parto de la nacia kulturo.

estas fakte tio. Tiamaniere nia historio aŭtomate  
taskis al la beleto la daŭran evoluigadon de la ling-  
vo, kaj efektive, Esperanto ŝuldas sian nunan riĉe-  
con preskaŭ ekskluzive al la traduka kaj originala  
beleto.

La fakto, ke la beleto en Esperanto ricevis ker-  
nan rolon, alportis plurajn avantaĝojn. El psiko-  
logia-propaganda vidpunkto tial, ke la ekzisto de be-  
leto de la lingvo nepre altigas la prestiĝon de Espe-  
ranto antaŭ la ekstera mondo, pro la iom simpligita,  
sed tre kutima rezonado: "Se beleto estas kreebla en



Jubilea Kolekto  
Jarkento de Esperanto



Fonto





La nivelo de la Esperanta beletra esence estas mezurebla — kaj konstante estas mezurata — enkadre de la Esperanto-komunumo, inter ni. Kaj ne lastvice per tio, kiom da homoj ĝi atingas, kiom da "konsumentoj" ĝi havas. Ni bone scias, ke en la pioniraj jardekoj — praktike ĝis la dua mondmilito — Esperantaj beletraĵoj vendiĝis en kelkaj centoj da ekzempleroj. "Stafeto" en la kvindekaj jaroj eldonis siajn librojn en mil ekzempleroj. Kompare al tio povas efiki esperige kelkaj aktualaj ciferoj: *Baza Literatura Krestomatio* dum 7 jaroj vendiĝis en 7 mil ekzempleroj, la originala romano *Eŭlalia* de Lorjak dum tri jaroj trovis 3500 aĉetantojn, István Nemere per *Febro* povis instigi same dum tri jaroj 2600 esperantistojn malfermi la monujon (espereble ankaŭ la libron mem). (Pardonu, ke mi citas ciferojn de hungara eldonejo, sed mi havas aliron nur al ties vendostatistikoj — UEA neniam publikigas ciferojn.)

Sur la sekvaj paĝoj de tiu ĉi rubriko konataj kreantoj de la Esperanta literaturo eldiras sian opinion pri la ĉefaj atingiĝoj kaj mankoj de nia centjara beletra. Oni povas konstati, ke la tono de la tuto respegulas fidon pri la estonteco de tiu "Cindrulino" de la Esperanto-movado, kiel nomas ĝin Piĉ, kies beletra kontribuaĵo cetere probable elvokos kelkajn kolerajn leterojn. Tamen, ĝia "eksperimenta" lingvaĵo tre elokvente pravas la vivecon de la Esperanta beletra, kaj aliflanke, la fakto, ke ni kuraĝas presi ĝin ĉi tie, eĉ pli elokvente la stabilecon de nia lingvo.

La beletraĵoj, kiuj aperas en la rubriko, ne estas ia "festa menuo". Akceptu ilin kiel senlakajn specimenojn el la momenta beletra oferto — pli-malpli tia estas nia literaturo en sia centa jaro.

Vilmos Benczik

## Belartaj Konkursoj 1987

UEA denove alvokas al partopreno en la Belartaj Konkursoj, kiuj jam dum 36 jaroj servis kiel valora instigilo por nia vivanta kulturo. Por ke ili daŭre restu tio, ni devas respekti ilian tradician rolon kaj klopodi laŭeble alteni la kriteriojn, kiuj devas tie validi. Apartan gravecon al la ĉi-fojaj Belartaj Konkursoj donas la fakto, ke ili okazas en la Jubilea Jaro de Esperanto.

**Konkursaj detaloj:** rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo, por kiu ŝi aŭ li konkuras. Unu persono povas partpreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

**Poezio:** Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo de konkursaĵo 200 × 65 tajpospacoj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

**Eseo:** Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400 × 65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

**Infanlibro de la Jaro:** Eldonejoj rajtas proponi infanlibrojn, originalajn kaj tradukitajn, kiuj aperis en la jaro 1985. Unu premio.

**Fotografio:** Minimuma formato 13 × 18 cm. Fotoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

**Kanto:** Teksto kaj melodio, kiuj povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj, devas esti novaj kaj ne publikigitaj. Unu premio.

**Reguloj:** la konkursaĵoj por la branĉoj poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto (t.e. teksto kaj muziknotoj) devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: s-ro Neil T.R. Salvesen, 32 Park Range, Victoria Park, Manchester, Britio M14

5HQ, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1987. Por la branĉo Infanlibro de la Jaro oni sendu tri ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same ĝis la 31a de marto 1987. En la branĉo Fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la adreso de Loka Kongreso Komitato (ul. Jasna 6, PL-00-013, Warszawa 1, Pollando) tiel ke la sendaĵo atingu tiun adreson antaŭ la 1-a de julio 1986.

La konkursaĵoj (escepte de la infanlibroj) devas esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun nomo kaj adreso de la konkurstanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras. Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo.

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkurstanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke ĝi aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn en aparta kongresa aranĝo. La teatraĵetoj povas esti ludataj aŭ legataj. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. La premiitaj kanto estu publike prezentita de kantisto aŭ ĥoro en la 72a UK, aŭ kaze de neeblo, en la postjara UK. Se eble, oni poste publikigas aŭ reproduktas la premiitajn verkojn en *Esperanto* aŭ alia revuo de UEA. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

**Premioj:** Unua premio 280 gld.; dua premio 196 gld.; tria premio 112 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio Nova talento (por la plej bona konkurstanto neniam antaŭe premiita) 196 gld. plus enskribo sur la pokalon Henry Harabaĝiu. Por Infanlibro de la Jaro 588 gld. Premio An-okin pri Kanto 280 guldenoj.





Giorgio Silfer (maldekstre) transdonas la premion al István Nemere.

## INTERNACIA LITERATURA FORUMO (Budapeŝto, 7-9 novembro 1986)

La Internacia Literatura Forumo ĉi-jare elektis la temon "Kolomano Kalocsay, ĉu la Danto de Esperanto?", kaj, inde al la temo, la loko de la kunveno estis la urbo de Kalocsay — Budapeŝto. Partoprenis 60 personoj el ses landoj.

La unuaj du tagoj entenis sep prelegojn, kiuj analizis diversajn facetojn de la kontribuo de Kalocsay al la Esperanta kulturo. Giorgio Silfer (prezidanto de LF-koop; LF = *Literaturo Foiro*) prelegis pri la ĉeftemo, kaj Georgi Mihalkov (Bulgario) ekzamenis la rolon de Kalocsay en la disvolviĝo de la moderna Esperanta poezio. Márton Fejes (Hungario) komparis tri tradukojn de la "*La tragedio de l' homo*" (tiun de Géza Bárczi kaj la du tradukojn de Kalocsay). Perla Martinelli (ĉefredaktorino de LF) komparis certajn elektitajn trajtojn de la verkaroj de Dante kaj Kalocsay. Vilmos Benczik (Hungario) parolis pri la efiko de la hungara kultura modelo al la vivoverko de Kalocsay, Magda Šaturová (Ĉeĥoslovakio) substrekis la signifon de la kaloĉaja verkaro por la esperantistaro en Slovakio, kaj Herbert Mayer (Aŭstrio) prelegis pri "Neologismoj: Kalocsay kaj la sekvo", atentigante ke la adeptoj de la nuna t.n. naturalisma skolo rigardas sin rektaj daŭrigantoj de Kalocsay — kio fakte estas malvero.

La prelegojn sekvis vigla diskuto, kaj, kiel ĉiam, oni luktis kun tempomanko.

Fine de la prelegoj Giorgio Silfer transdonis la premion "La Verko de la Jaro 1985" al István Nemere pro lia originala romano *La Monto*. Jam la duan fojon Nemere-verko atingis tiun honoran titolon: la unua estis *La blinda birdo* en 1983.

La 9an de novembro la Forumo daŭrigis sian agadon en Abaújszántó, la naskvilaĝo de Kalocsay, kie d-ro Vilmos Sággy, la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, inaŭguris buston de tiu elstara figuro de la Esperanta kulturo.

## Kiel fartas nia beletro?

Sojle de la Jubilea Jaro ni scivolis pri la farto de la Esperanta beletro, kaj direktis tri demandojn al dek aktivaj literaturaj kreantoj, iom hazarde, tamen plimalpli reprezente elektitaj. La respondoj desegnas por ni buntan bildon de opinioj, el kio sekvas, ke monotoneco, grizeco ne minacas la Esperantan literaturon. Jen la tri demandoj:

1. Kion vi verkas nun?
2. Kion vi taksas la ĉefa atingaĵo de la Esperanta literaturo dum la lastaj du jardekoj?
3. Kio laŭ vi pleje mankas al la Esperanta literaturo sojle de ĝia centa jaro?

### Marjorie Boulton (Britio):

1. Post longaj esploroj, libron pri originalaj Esperantaj dramoj, minvejno surprize riĉa; tradukon de du majstroverkoj de frua angla religia poezio; volas plu vivi por pli kreaĵ tas-koj.

2. Sune centre: *Plena Ilustrita Vortaro*, normigilo, kontrolilo, trezoro de precedentoj, informoj, stilaj konsiloj; neelĉerpebla atestilo pri matura lingvo. Ne havante spacon por galaksia listego, mi menciuj kelkajn brilegajn stelojn: *Tutmonda sonoro*, *Aniaro*, sonetojn de Ŝekspiro, *La Luzidoj*, fabelojn de Krilov, inter tradukoj; eseojn de Waringhien; la monumentan duan eldonon de *Esperanta Antologio*. Grava ankaŭ estas *Monato*, ne movada Esperanta ĵurnalismo.

3. Denove, listego ne eblas. Mi sopiras al la nova ĝisdata *Enciklopedio de Esperanto*; al altnivelaj dramoj; eble la mondo pli bezonas bonajn internaciajn sciencajn librojn. Mi volus vidi pli da atento al la kulturoj kaj la bezonoj de Afriko.




### Edwin de Kock (Sud-Afriko):

1. Ambician epopeon de sep libroj kun sepdek ĉapitroj pri la homaj sorto kaj historio, krom iuj lirikoj ĉefe pri mia vojaĝo tra Eŭropo kaj Israelo en 1985.

2. La plimaturiĝon de ĝia originala poezio, apud kiu la tradukoj fariĝis relative malgravaj.

3. Efika kritiko, kiu interalie ne plu laŭdos verkojn bagatelajn aŭ daŭrigos la ridindan supertakson de tradukoj. Apud tio la diskonigado de niaj plej bonaj originaloj per traduk-antologioj en la naciaj lingvoj.








**Lorjak (Francio):**

1. Kion mi verkas nun? Senfinan babilaĵon komencitan antaŭ jaroj, ĵus interrompitan dum 6 monatoj pro kirurga distraĵo, sen scii ankoraŭan titolon, nek ideon, eĉ malprecizan, pri ĝia longeco.

2. La ĉefa atingajo verkista, laŭ mi? — Nedubende: *Kiel akvo de l'rivero*; en la limoj de mia libroprovizo.

3. Kio mankas? — Rido, kaj (ve!) legantoj!



**Miyamoto masao (Japanio):**

1. Mi verkis pri Pak Hunyung, la korea revoluciulo kaj esperantisto, sed ĝi ne aperis ankoraŭ. Nun mi luktas kun "Sifo, *La Voĉo de la Popolo* kaj Esperanto", kaj eble tuj kun "*La Novaj Tempoj*",

ĉina anarkiista gazeto eldonita en la komenco de la jarcento.

2. Certa nivelo de nia originala literaturo, sed ankoraŭ ne matura.

3. Mankas al mi kontraŭnuklea prozo, preskaŭ neniome aperis tia. Mi scias, ke kulpas en tio, antaŭ ĉio Miyamoto mem.



**István Nemere (Hungario):**

1. Mi verkas novan romanon, ĉi-foje sciencfikcian, kies titolo estos la latina vorto "Terra". Ĝi estos sciencfikcio, saturita per filozofio.

2. Laŭ mi la ĉefa atingo de la Esperanta literaturo dum la lastaj jardekoj estis tio, ke aperis kelkaj libroj — kelkaj nur — kiuj atingis la nivelon de la nacilingvaj literaturoj. Antaŭe ŝajnis al mi — aŭ eble mi estas nesufiĉe informita — ke malofte aperis io tiaspeca, kaj nun tiuj libroj donas al mi la esperon, ke la Esperanta literaturo atingos la nivelon de la nacilingvaj.

3. Mia respondo je la tria demando ligiĝas al la dua. Ĉefe mankas al la Esperanta literaturo rekono en nacilingvaj rondoj, tial estus tre bone, se oni ektradukus al naciaj lingvoj la plej maturajn verkojn de nia lastatempa literatura produktado.

**Karolo Piĉ (Ĉeĥoslovakio):**




1. Mian kvaran romanon. Ĝi rakontas pri fikcia Ordeno de Verkistoj, kies gemembroj tute nesanktule, malgraŭe tamen plene fakule okupiĝas pri la elkreado de la originala literaturo Esperanta.

2. La ĉefan atingon de la Esperanta literaturo inter 1966-86 mi vidas en tio, ke estis *multaj unuopaj* atingoj. Paŝoj ope kaj abunde.

3. Mankas financoj, kaj (tial) mankas eldonejoj, kapablaj rapide kaj tuj enmerkati ĉiun kvalitan novan verkon ĵus skribitan. Mankas pli profunda "literatura" engaĝiĝo ĉe UEA (ĝis nun la literaturo estis pli malpli nur Cindrulino tie). Kaj mankas almenaŭ dek mil senlacaĵoj kaj aĉetemaĵoj E-legantoj.

**Baldur Ragnarsson (Islando):**



1. Antaŭ du monatoj mi komencis verki novan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo. Unu el la plej grandaj eldonejoj en mia urbo akceptis ĝin eldoni en la Jubilea Jaro. Bedaŭrinde, pro profesiaj kialoj, mi ne povis laŭplane daŭrigi tiun laboron dum la pasinta monato, sed esperas trovi tempon por tio en decembro kaj januaro. Mi ankaŭ laboras nun je preparado de informa gazeto pri Esperanto en la islanda kun mia sindona kolego Hallgrimur Saemundsson, kiu nun estas la prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio. En la pasintaj jaroj mi pleje min okupis pri verkado en la islanda lingvo, en kiu mi aperigis jam dek librojn. Dum miaj ses jaroj en la Estraro de UEA mi preskaŭ ne havis tempon por alia verkado en Esperanto ol artikoloj kaj leteroj. Lastatempe mi tamen komencis okupi min denove pri la poezio.

2. El la libroj originale verkitaj en Esperanto dum la lastaj du jardekoj mi plej alte taksas la esejon de prof. Waringhien: *Kaj la ceter' — nur literaturo*. Ĝiaj stilo kaj enhavo nepre levas ĝin alte sur la literatura skalo, kvankam ĝi ne estas belliteraturo en la ordinara senco.


3. Mi ŝatus vidi plian evoluon de la romano kaj la novelo. Ankaŭ la poezio bezonas renovigan stimolon. Pleje tamen mankas vere meritaj originalaj dramverkoj, tie restas ankoraŭ vakuo en nia literaturo.



**Reto Rossetti (Britio):**

1. Krom unu-du recenzoj, nenion.

2. En originalo, (a) la nova ondo de prozaj talentoj: Tóth, Nemere, Štimec, Kamaço, Moleono, kun freŝaj temoj de aktualo kaj futuro, kaj (b) la eseoj de Waringhien. Aparte: *Sisteme ordigita vortaro* de Michele Mariano. En traduko: *Kalevala*, *La*



## **BELARTAJ KONKURSOJ 1986 ORIGINALA POEZIO: UNUA PREMIO**

### **Adoro**

*Neniu mi, neniu iluzio,  
nur alturniĝ' adora,  
sur branĉo de mondarbo nur folio  
aŭtunkolora.*

*Matene sub la vintra lumkareso  
la nudaj arboj festas  
kaŝitan energion kaj sen ĉeso  
ĝojplenaj restas.*

*Neniu terestaĵo mutas ŝtone,  
vibras granit' submane,  
riveroj, arboj dancas elektrone,  
kantas peane.*

*Senhalte la vivanta universo  
elverŝas sin torente,  
en monda epopeo ĉiu verso  
atestas elokvente.*

*Dum mi kunstaras kun la kontinuo  
atente kaj silente,  
dum mutas mio, la interna bruo,  
eĉ nur momente,*

*distanco estas for kaj tempobaro,  
samtempas arbo verda kaj aŭtuna,  
mi estas unu kun la homfrataro  
pasinta, nuna.*

**Albert Goodheir**

*Luzidoj, Brand, Tra la parko de la franca poezio.*

3. La apliko de la internacia lingvo al esploroj sciencaj/lingvistikaj (por kio ĝi aparte kaj senkonkure taŭgas). Influo sur la lingvon de slavo kaj orientlingvanoj unuavice. Originalaj verkoj en la serio Okcidento-Oriento. Mi mem proponis larĝan studon: *Skizo pri la homa inventemo*, sed ĝi trafis en silenton. Ties unua ĉapitro, *Arto kaj naturo*, aperis en *Monato* 1985. Muzikaj/primuzikaj verkoj. UEA konfesis sin nekompetenta juĝi la kontribuon ĉisfere de Urban, Pumpr, Kořinek.

**Giorgio Silfer (Eŭropo):**

1. Jam de unu jaro estas prespreta mia dua poemkolekto, *Derislava ridetas*, kie situas ankaŭ kelkaj noveloj. Plej laste okupas min fakte prozo, ekzemple du romanoj estas komencitaj sed, ve!, la organizaj zorgoj pro LF-koop malhelpas finverki.

2. La ekesto de literaturkritika plurismo. Pere de *Literaturo Foiro*, de *Hungara Vivo* kaj aliaj iniciatoj, ne nur periodaĵoj, la esploro pri la valoroj kaj signifoj de la E-literaturo fariĝis pli nuancita, pli profunda — tiel ke ni staras sojle de nova periodo, post la unuaj "literaturhistoriaj sistemigoj", ofte tro dogmecaj, en la 30aj kaj 50aj jaroj de ĉi tiu jarcento.

3. Geniuloj kaj financaj rimedoj. El kio sekvas la engaĝo de LF-koop (kaj du aliaj) cele al la formado de adekvataj kondiĉoj por ke manifestiĝu la talentoj.

**Spomenka Štimec  
(Jugoslavio):**

1. Kion mi verkas nun? Iun prozon, estas sufiĉe simple respondi. Tamen la demando iel estas maltrankviliga, maldiskreta. Meze de duboj, for de finfaro, kun la demando, ĉu indas elstarigi virinajn sentojn "dum la mondo pereadas". Konsolas min la opinio de la jugoslavia verkisto Danilo Kiš: "Gravas ne la temo sed la sentemo de la aŭtoro."

2. La ĉefa atingiĝo: *Esperanta Antologio*. Ĝi per sia abundo kaj amplekso kuraĝigas. Ĝi ekzistas, ni ankaŭ ekzistas. Krome amaso da indaj tradukoj el diversaj lingvoj. Inkluzive el tiuj kiuj geografie ĉirkaŭas mian lingvon.

3. Kio mankas? Pli kompetentaj aŭtoroj, kompetentaj recenzantoj, kompetentaj legantoj. Pli da libroĉetpovo ĉe ĉiuj.

vb





# Manpleno de hodiaŭa poezio

Albert Goodheir:

## Lumo sur dolmeno

Betuloj flavas, brunas fagarbaro,  
inter kratagaj dornoj ruĝas beroj.  
Anseroj preterflugas sudenire.  
Aŭtunas; kune kun la falfolioj  
la homa koro serĉas sian grundon.

La forgesita centro nin altiras.  
Aglofluganta ĉirkaŭ montopinto  
en vastiĝantaj cirkloj, akvoringoj  
sur lagsurfaco pro falinta ŝtono,  
jen ni, ĝis nin aŭtuno turnas enen.

Preter pensebla horizonto vasta  
kaj eta pli ol ero subatoma,  
sencela, senresponda la ĉiomo,  
ĝis subpremita scio de la koro  
lokiĝas en sanktejo poradore.

Inter la foliaro ventokirla  
dolmeno enkorpiĝas ŝtonamase  
adorfokuson de pasinta mondo,  
pasinta, sed ĉiama; nun denove  
altiras ĝi la koron atenteman.

Kiam la ruĝa suno en subiro  
brakumas la amatan terdiinon,  
ekbrilas la granito de dolmeno,  
momente revidebla luma centro  
de komunumo preter tempkurteno.

Piedoj la sanktejon rondirante  
tretis la teron, kie mi nun staras,  
dum ostojn de mortintoj oni metis  
en la dolmenon, korpon de patrino,  
por ke revenu homoj novnaskite.

La turniĝanta tempotajdo portas  
memoron el pratempo forgesita.  
Denove lumo brilas sur dolmeno  
kaj en la folifalo de epoko  
burĝonas jam la onta unueco.

(El *Enlumigo*, aperonta poemaro)

Mikaelo Ternavski:

## Binoklo

*Al Marjorie Boulton*

se mi ricevus donace tian binoklon  
ke mi povus rigardi tra ĝi kaj ekvidi:  
jen la Feliĉo jam jungas bovojn  
ĉar ĝi devas veturi al mi

se mi ricevus donace tian binoklon  
ke mi povus rigardi tra ĝi kaj ekvidi:  
jen la Feliĉo jam enĉariĝis  
do ĝi pretas veturi al mi

se mi ricevus donace tian binoklon  
ke mi povus rigardi tra ĝi kaj ekvidi:  
jen la Feliĉo jam veturas laŭ vojo  
renkonten al mi  
renkonten al mi

estas domaĝe ke en nia epoko  
de kosmoŝipoj  
la Feliĉo preferas veturi per bovoj  
tamen  
se mi ricevus donace tian binoklon  
mi estus feliĉa



Gafur Gazizov:

## Soneto al sonato

Knabino dun vespero hor'  
per fingraj gutoj pluve ludis  
sonaton. Ploris ŝia kor'.  
Jam larmaj ondoj min eklulis.

Enfluis l' mondon la sonar'.  
La sango jam ĝis gorgo gluglis.  
Mi dronis en la ŝtorma mar',  
sed super mi ŝi lare flugis.

La mevo-revo de l' pasi'.  
Sinjoro van Beethoven, dankon!  
Pro la tempesta fantazi',  
mi en genio via ankaŭ  
pereis per la emoci'  
por verŝi sangon en la sangon.



Imre Szabó:

## Heredaĵo

ferŝranketo  
duonskatolo da alumetoj  
trione fumita cigaredo  
injektiloj  
spirigilo  
oksigen-balonoj  
ferlito  
multaj blankaj tolaĵoj  
konkava vizaĝo



Baldur Ragnarsson:

## Neĝo

Nenio okazis post la fermo de la pordo  
La neĝa tavolo estis netuŝita  
mi antaŭvidis miajn spurojn trans la straton  
preter la parkon kaj supren sur la deklivo  
ĝis la renkontopunkto kie la tero  
ĉesas ekzisti

En mia poŝo kuŝis la ŝlosilo  
retenanta sian vivantecon malgraŭ la vorto  
sensankciiga.

Mi serĉis mian pipon  
kaj per manoj strange netremigeblaj  
plenigis ĝin per dana tabako

Nigra kato alkuris de sub la arboj  
postulante mian atenton dum mi serĉis  
neuzitan alumeton kaj kvieto  
invadis mian menson pace kiel decas  
al tia sento meze de la nokto  
antaŭ neĝa tavolo  
netuŝita

Edwin de Kock:

## Temposmozo

Noktremparo. Kelkaj nur magraj steloj  
trans la montojn rigardas  
en la silenton de Ceppagna.

El la dormanta ĉambro  
pensojn mi repromenigas  
apud la posttagmezan kampon  
kun amiko, poet' Itala,  
ĉe tiuj randoj de l' kvieto  
kie, krom herbo, ĉiam pli longombra  
kreskas la historio.

Kaj mi scias, ke sur marmoro  
blanke fragmenta,  
kie la templo malaperis,  
el la arbustoj blonde —  
nudpieda kaj parfumita —  
sinjorinas la luno  
apud aliaj planedoj.

Paŝvojeto apenaŭa, ŝrumpinta  
el jarmila irejo,  
larĝa tra lando.  
Cipo delonge forviŝita,  
krom en vilaĝa nomo.

Ne venton mi aŭdas, sed la haltovokon,  
tintan metalon, ledon kaj murmurojn  
en Latino vulgara.  
Baldaŭ okul' interna vidas  
formojn ne altajn —  
grizajn lunlume —  
revojaĝantaj norden,  
tra aliaj montoj, soldatotakte  
sur la senfina marŝ' al Romo.

1986.10.10

O. Kníchal:

## Kalvario

Milfoje mirakli vi povas  
Bonfare satigi amason  
Malfermi okulojn de blinda knabo  
kaj lepron elkuraci  
Sed tronposteni kun Cezaro?  
Se krono tiam krono dorna  
kaj kruco senindulge peza  
kaj vojo krutascenda  
al Golgotmonto



Miyamoto masao:

## Omaĝe al Majo\*

Vespero jam falas. Nia aŭto kuras kaj kuras, mi mem ne scias kien, mi konfidas ĉion al la kamaradoj. Malsame al Osako, mia dezerta urbo, Pekino havas grandan longan rektkuran aleon kun sombraj arboj. Ĉu poploj aŭ salikoj; ŝajne ili restas ĉiel indiferentaj, kaj mi ne povas certiĝi en la kuranta aŭto.

— Ĉu tiu... ne "Volgo"? — mi rimarkas la rusliteran skribon sur la aŭto.

— Jes... de Sovetio.

— Ĉu?

Mi silentas, la kamaradoj ekkantas samtempe, mi ne rimarkas, kiu la unua. Liu Ling, Zhang Haiping kaj Li Shijun gaje kantas. Ili venis al la flughaveno por min akcepti. La melodion mi tre bone konas: *Burlaki na Volge* (Ŝiptrenistoj sur Volgo), sed mi ne sekvas, ne povas sekvi, ĉar mi ne parkeras la tekston, kaj ... mi estas konata sensciulo pri muziko. Kvankam mi mem prove tradukis la kanton pro granda malkontento al Karl Bennemann, kies traduko estas tre malproksima de la originalo... La gaja kunkantado daŭras, mi povas aliĝi nur ĉe *Ajda da ajda*. La ŝoforo restas muta.

*Ej, ruk ruk! Ej, ruk ruk!*

*Marŝas ni la bordon nun,*

*kaj ni kantas al la sun'.*

*Ajda da ajda! Ajda da ajda!*

*Kaj ni kantas al la sun'.*

\* En majo de 1985, okaze de la 35-jara jubileo de EPĈ, Miyamoto vizitis Ĉinion — tiu vizito inspiris la jenan verkon.

Vesperas majo. Kuras "Volgo". Jes, mi venas la landon, la unuan respublikon de Azio, la unuan socialisman landon de Azio. Mi vidos propraokule, kia estas ĝia socialismo, kia estas ĝia respubliko.

Nebulas posttagmeze estuaro de la rivero Huangpu. Nebulas la maro, ne videblas horizonto. De ie siĝis, de la fora maro. Mi staras sur zono laŭrivera, kiun iam imperiistoj nomis sialingve "Band". La granda ponto, siatempe nomata Garden Bridge staras malantaŭ mi, ne malproksime. Mi scias, trans tiu ĉi ponto iam troviĝis la koncesiitaj kvartaloj. Nun kelkaj junuloj ĉi tie vigle kaj takte sin movas, ili ekzercas sin per "tajĝiĉuano".

*Ĉu Verda Majo*

*ĉi tien surlandiĝis?*

— *Huangpu 'a kajo.*

Mi devas konfesi, ke ĉio ĉi estas nur fikcia, mi ne scias nek demandas, kien ŝi surlandiĝis en 1937, kaj kie sin kaŝis.

Oktoobre en 1930 Oosugi Sakae, japana anarkiista ĉefo kaj pioniro de la Esperanto-movado, atingis ĉi tiun havenon ŝtelire el sia lando, por ke ĉi tie li parolu kun Li Dunghwi, revoluciulo, komunista membro de la Korea Provizora Registaro establita ĉi tie, kun Chen Duxu, la unua ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj kun Gregorij Vojtinskij, komisiito de Kominterno, veninta el Sovetio. Ili havis la Konferencon de la Ekstrem-Orientaj Socialistoj ĉi tie; mi scias, kie ili kunsidis, sed ĉifoje...

En ĉi tiun urbon venis iam Yamaga Taizi, japana anarkiisto kaj esperantisto, por helpi la eldonon de "La Voĉo de la Popolo" kontraŭleĝe presata en koncesiita kvartalo. Sifo, ĝia redaktoro kaj administranto kaj presisto, jam suferis pulman karcinomon tiutempe. Li mortis post nelonge, sed lia gazeto





estis la unua anarkiista kaj esperantista periodaĵo en la historio de Ĉinio.

Ĉi tien iam venis Vasilij Eroŝenko, kaj indignis antaŭ la avizo ĉe la enirejo de parko: "Ĉinoj kaj hundoj ne rajtas eniri". Kun larmoj el la nevidantaj okuloj li prikantis la malfeliĉon kaj esperon de la Aziaj popoloj. Mi ne scias, precize kie li ploris sian maldolĉan ploron.

Serenas la parko Hongkou. Mi demetis la ĉapon antaŭ la statuo de mia granda instruisto, jes granda



por mi kaj por ĉiuj Aziaj popoloj. *Lusin* li sin nomis.

Iam en la parko orgojlaj japanaj generaloj, admiraloj kaj koloniistoj havis sian jubilean solenaĵon pro malgranda venko super ĉinoj. Kaj eksplodis bombo, mortis generalo, vundiĝis multaj oficiroj kaj aliaj, inter kiuj Sigemitu Mamoru, pliposta ministro pri eksterlandaj aferoj, li estas kontata pro la perdo de kruro. La teroristo estis koreo, sin nomis Yung Bongkil, kaj estis ekzekutita.

En ĉi tiu urbo iam laboris Kominterno. Ĝiaj aktivuloj estis diversnaciaj, el ciu mondparto alfluis ĉi tien revoluciuloj. Inter ili ankaŭ Richard Sorge. Li samtempe amikiĝis kun Agnes Smedley kaj Ozaki Hotumi. Ili kune batalis por bari la minacan krizon de la mondmilito. Kaj ĝuste pro tio Sorge kaj Ozaki poste en Tokio ricevis pendumilan maŝon.

Multaj-multaj koreoj, japanoj kaj aliaj venis tien ĉi, kaj la urbo fariĝis krisolo aŭ bedo de la Azia revolucio. Tra tiu ĉi urbo multaj iris norden, al Vladivostoko, al Ulanbatoro, kaj tra ili al Moskvo, kiu siatempe estis la stelo de la idealo, jes, ĝi estis...

Mi staras antaŭ duetaĝa domo sur strateto de tiu ĉi urbo. Ĉi tie iam sidis la centro de Ŝanhaja Esperanto-Ligo. La pordo estas fermita, tiel ke Xian Sijia, Wang Minhao kaj mi ne povas eniri, sed mi povas imagi al mi... Antaŭ 50 jaroj en ĝia malvasta ĉambro viglaj junuloj kunsidis, gaje diskutis, ridoj eksplodis. Inter ili troviĝis Ĵelezo, Chen Qicheng kaj ... ankaŭ nia Verda Majo. Ĉi tie ili iam redaktis "La Mondo"-n, multobligis "Ĉinio Hurlas", alvokis:

"Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". Tuj baldaŭ ektondris kanonoj japanaj minace kun dentegoj avidaj... Jes, Ĉinio hurlis, sed... nun estas la vico, japanoj devas hurli, sed mi scias, japanoj ne hurlis, nek hurlos, ĉar...

Sur la pavimon de la Nankin-strato falas delikate silka pluveto. Nimbuso proksimas minace super la sombraj aleaj arboj, kiuj, malsame al tiuj de Osako, preskaŭ kovras la straton, ili karesas mian kapon. Homoj iras sin puŝante antaŭen, sed ili neniam rapidas, samkiel la aŭtoj preterirantaj, kiuj por japanaj okuloj aspektas nur rampantaj.

Vesperas Ŝanhajo.

— Ĉi tie iam ĉinaj strikantoj el japana ŝpinfabrika manifestaciis, kaj anglaj policianoj pafis ilin...

De apude la juna Wang alparolas min. Ha, mi memoras, jes, mi jam trovis afiŝojn du aŭ tri: Mitingo por la datreveno 60a de la Tragikaj Okazaĵoj de la 30a de Majo. Hodiaŭ...? Ha, mi ne havas tempon, mi devos flugi al Pekino morgaŭ matene.

Sub majaj pluveroj agrablaj al la vangoj mi kaj Wang reiras al la hotelo tra la Urumqi-strato. Morgaŭ mi revidos Benczik kaj la aliajn.

Mi amas Ŝanhajon, kiu, dank' al la ironia sorto, per siaj koncesiitaj kvartaloj servis multe por la bono de la Aziaj popoloj.

### Spomenka Ŝtimec:

## Fragmentoj pri la infanaĝo (El aperonta prozaĵo)

(.....)

La biciklo, kiu tage servis, vespere malutilis. Ĝi staris en iu antaŭkoridoro kaj denunciis min al la gepatroj. Tre detale, tre aĉe. Dum ili preteriris, ĝi rakontaĉis ĉion kion mi faris kaj kio estis malpermesata. Ili envenis en la kuirejon, kie mi sidis, kaj eblis plu nenion diri. Ĉio jam estis konata.

— Se vi estos malbona, la biciklo diros! — estis la minaco de la servistino.

Mi volis plaĉi al la biciklo, sed iel ĝi havis siajn proprajn kriteriojn.

Foje mi eĉ tiom humiliĝis, ke mi iris pardonpeti al ĝi. La kialon mi nun ne plu scias, sed jes, mi konas la ekscitiĝon; necesis trairi la koridoron, veni tute proksime kaj eldiri la pardonvortojn. Espereble mi ne algenuiĝis. La vortumon mi ne plu memoras, nur la forkuron de ĝi, en etaj ŝuoj. La koro batis en la gorgo.

Mi neniam kaptis ĝin dum la denuncado. Al mi ĝi nenion diris, iam ajn, eĉ ne unu vorton. Sed mi sciis kion ĝi faras. Al mi ĝi nur severe silentemis en la mallumo.



En la vilaĝo ne ekzistis elektra kurento. La krepusko longe daŭris. Nur kiam estis tre mallume la patro ekbruligis la petrollampon. Rita bruligado. Verŝi petrolon, purigi meĉon, bruligi, kovri la flamon per vitra cilindro. Mi volis esti apud li ĉiuvespere kiam li kreis lumon. Alumeto, flamo, brilo. La flamo volis eskapi kun la alumeto. Ĝi ne ŝatis tiujn vesperajn kaptiĝojn. Sed ne eblis alie. Ĝi devis loĝi en kastelo el vitra muro, kaptita kiel feino. Tuj kiam ĝi estis fermita, gardostare leviĝis la ombroj sur la murojn. La patro levis ĝin al la sranko, la ombroj sur la muro minace ekmoviĝis. Mi tiris mian seĝon pli proksimen al la patro.

— Ĉu la biciklo estis nigra? Forta? Pro kio timinda?

La demandoj multajn jarojn poste petis detalojn. Tute ne. Ĝi estis tre ordinara, tre simpla. Eble ĝi havis ankaŭ tiun plektitan reton ĉirkaŭ la rado por preventi infanajn friponaĵojn, por ŝajni pli milda. Estis nenio en la biciklo, kio igus ĝin timinda. Sed estis la



silenta interkonsento inter ĝi kaj mi. La interkonsento kiu funkcias inter aĵoj, bestoj kaj homoj. La interkonsento kiu igas min tiomfoje ne kompreni la kialojn. La kialojn de timoj, la kialojn de amo. Ĉu la homo kiun mi amas estas nigra? Granda? Inter li kaj mi senforte funkcias la sama sekreto kiel inter mi kaj la biciklo tiame. Kaj la sekreto de la interkonsento estas pli forta ol ĉiuj argumentoj.

Aŭstralio. Ĉu mi jam rakontis? La ludo estis tre simpla: oni devis meti la pilkon sur la signitan lokon, en la centron. Ĉiuj infanoj ĉirkaŭis ĝin, kun la mano sur la pilko. Oni atendis la vokon de la juĝisto. Li, flanke, kun papero en la mano notis poentojn. Ĉiu infano portis la nomon de iu lando. Je la voko necesis kapti la pilkon kaj trafi iun ajn.

Pafu, pafu... Aŭstrio! Sufiĉis aŭdi Aŭs... tra la streĉo de la atendado kaj mi jam kaptis la pilkon. Fuŝ! Erare. Mi estis iu alia. Sed la konfuzon mi akceptis, por rilati al la neatingebla lando de la avino.

Pafoj? Militoj? Infanaj militoj kreskis en la korto de la lernejo. En ili kreskis mi, precipe nokte.

La ventron, el kiu venis mia fratino, mi ne memoras. Sed oni riproĉis min jam la unuan tagon. Laŭdire mi sidiĝis sur la fenestran breton laŭte kriante: homoj, venu ion vidi! Venu ion vidi! Pluraj envenis. Tie estis ŝi, ĵus naskita. Panjo, hororigita pro la envenintoj, apenaŭ kredis: kio? Ŝi vokis vin tra la fenestro?

La fratino havis humidajn manplatojn. Kia plaĉo doni al ŝi mian fingron... Ĝi estis ĉirkaŭbrakita de varmo kaj humida teno. Hodiaŭ la infanoj, kiam ili estas tre etaj, kapablas redoni ŝian tuŝon.

Vaganta fotisto vizitis nian vilaĝon. Ŝi jam marŝis, iom ebrule pro la malcerto. Oni vekis ŝin pro la fotado. Strioj de la kuseno sur ŝia vango. Ni nutru kokojn. La fotisto kaŝis sin malantaŭ la nigra jupo de la aparato. Ŝia manplato, tuteta, sur kiu maizgrajnoj algluiĝis, etendiĝis antaŭ miaj okuloj. Iu kokino, tre nigra, scivole alvenis. Ĉu post tiom da jaroj la grajnoj ne gutas papere?

La manojn mi ŝatis, ne nur ŝiajn.

En la antaŭo de la klaso okazis eksperimento. Pri fiziko, verŝajne. La instruistino tre klopodis. Mi flustris ion kun la knabo sidinta malantaŭ mi. Li prenis mian manon kaj tenis ĝin dum la respondo. La instruistino, laca de duboj, petas min formuli la rezulton de la eksperimento. La rezultoj? La mano tre plaĉe nestis. Nu, kial la akvo ne elfluis, kiam mi turnis la glason?

— Ĉar vi sekrete tenis la paperon kiel kovrilon!

Ŝi ne volis kredi je la fuŝo.

— Sed mi montris al vi, ke mi ne tenas la paperon.

— Jes, la aliaj povas tion kredi. Ilin vi povis trompi. Min ne.

Mi sidiĝis kontente. Ŝia vizaĝo ruĝis. La fiziko estis tre travidebla. Liaj rigardoj varmis en mia dorso.

La patro envenis kaj volis rapide fini kion li devis:

— Aŭskultu, kuracisto diris al panjo, ke ŝi devos naski ankoraŭ unu bebon kaj tiam ŝi pli bone fartos. Nun post tiom da jaroj la frazo ŝajnis unuspira.

— Kiu kuracisto? Ĉu tiu kiu kuracis Stefinjon? Li asertis, ke ŝi havas pulmoniton, kaj poste montriĝis, ke ne estis tio. Li scias nenion. Demandu iun alian.

Kelkajn tagojn poste li revenis. Kun la sciigo, ke la alia konfirmis.

La senpoveco premis min al la muro. Bebo?

— Sed mi ne portos kvinan seĝon al la manĝotablo — estis la lasta defendprovo.

— Vi ne bezonas. Mi faros.

Ne eblis saviĝi. La aserto, ke en la kuirejo ekzistas nur kvar seĝoj, kaj nun la familio fariĝos kvinseĝa, efikis malpli ol la klopodo trovi pli justan kuraciston.



La morbilo ĉe la fratino. Oni kaŝis la spegulon antaŭ ŝi. Kuracisto en la ĉambro. La panjo eliris serĉi iun tukon. Mi devis rapide sciigi kion mi devis, sen ke ŝi sciu. Ŝi malgajiĝus, mortoj estas malagrablaj por la patrinoj. Sed la doktoroj sciu la veron.

— Sinjoro doktoro, mi havas kanceron! — anhelon en la voĉo. Ne pro la teruro, sed ankaŭ pro la panjo



kiu povus reveni antaŭ ol mi finu. Iu onjo mortis de kancero. Mi bone komprenis, ĝi komenciĝas per monteto.

— Kie, anĝeleto? — li serioze rigardis. Li volis helpi. Mi scias, ke tio estas nekuracebla. Sed mi ne volis diri, ke mi scias, ke li povas nenion. Helpeme mi deprenis la bluzon. Kun iom da memkompato mi montris al li la maldekstran flankon de la brusto. Li alproksimiĝis al mi kaj ekridetis. Li rigardis la tutan bruston. Kaj ridetis tre ĝentile:

— Ne timu, ne estas kancero, kara mia. Mametoj kreskas al vi.

Mi ekbutonumis la bluzon. Sub ĝi mi rigardis al la alia flanko. Ĝin mi tute neglektis. Vere. La kancero je paralelaj lokoj. Mi estis trista pro la fuŝita diagnozo, kaj iomete gaja ĉar tio ne estas mortiga; kaj hontigita, ĉar mametoj al io honta rilatis.

— Ŝi jam havis morbilon — ripetis la panjo vidante min dum butonumado.

— Jes, ŝi estas sana — diris li ĝentile. Kaj nenion plu. Li klaĉis pri mi nur en la koridoro. Aŭdeblis la rideksplodo de la panjo. Kaj la fratino malbutonumis la piĝamon kaj komencis esplori sian ruĝan haŭton.

La panjo revenis. Ŝi penis havi seriozan vizaĝon. Mi staris ĉe la fenestro kaj estis tre trista ĉar mi ne havas kanceron.

— Kiam kreskos miaj mametoj? — volis scii la fratino.

— Unue devas kreski vi, poste ili — diris la panjo gaje.

— Kiom da fojoj mi devas ankori dormi ĝis tiam? — ŝi insistis. Noktoj estas mezurunuoj de la infanaĝo.

— Multajn.

— Pli ol cent?

— Pli.

Cent estis senfino.

Mi staris ĉe la fenestro kaj pretis plori. Mi ne volis esti granda. Mametoj havas plenkreskulojn. Mi ne volas esti tia. Estis tre humilige. Havi mametojn kaj havi malgrandan fratinojn.

Sed ŝi ne volis atendi ĝis cent.

Iun tagon post la resaniĝo, la najbarino alkondukis ŝin hejmen: ŝi rondvojaĝis sur la karuselo ĉe la foiro. Sur la puloveron ŝi fiksas la mamtenilon de la panjo. La korbetojn ŝi plenŝtopis per ŝtrumpoj. Ne sufiĉis la ŝiaj. Ŝi prenis ankaŭ la ŝtrumpojn de la patro. Kaj ŝi rondiris per karuselo, alte super ĉiuj, feliĉa kaj neatingebla.

La libroj komencis havi malfeliĉajn finojn. Mi ploris nokte. Patro venis kaj klopodis konsoli.

— La knabo foriris de la domo! — veis mi. — Sed lia panjo nun vivos pli feliĉe! — li klopodis mildigi. Mi ne akceptis. Li komprenis, laca kaj miskombita, ke estos pli simple elpensi alian finon. Ke la verkisto jam verkas la alian libron en kiu la knabo revenos. Tio jam ŝajnis akceptebla. Mi ŝovis la malsekan vizaĝon en la kusenon kaj ekspiris pli kontente: eblas elpensi feliĉan finon.

Ial mi ne suspektis, ke la libroj havas malfeliĉajn finojn, ĉar la mametoj kreskas.

(.....)



István Nemere:

## La tagoj de la senfina tempo

LUNDE matene Jozefo vekigis kaj iom dormeme rigardas antaŭ sin. Tra la breĉoj de la muro de la lignotenejo enbrilas la suno. Nun estas somere, do la junulo ne sentas malvarmon. Sed li loĝas ĉi tie ankaŭ vintre; tiam ĉiu breĉo estas glaciblovanta malamiko.

Jozefo stariĝas. Sur la korto jam svasmas la vivo, krietas porkidoj, kuradas kokinoj. Sinjorino Marta manĝigas-trinkigas la bestojn. Ŝia edzo jam delonge foriris labori. Jozefo tuj kaptas la ujon de brano kaj iras miksi la porkan supon. Poste li portas al la subtegmentejo sakon da maizo. Sinjorino Marta ne diras: bonan matenon, Jozefo. Ankaŭ Jozefo diras nenion, li nur ridaĉas. Iom poste li ricevas grandan tason da laktokafo, du bulkojn, kaj li estas feliĉa.

— *Ha-mana-ha* — li diras, ekbrilas lia rozkolora dentkarno kaj la flavaj dentoj. La hararo senkolora pendas antaŭ liaj okuloj. Ĉirkaŭ la fortegaj ŝultroj streĉiĝas la senkoloriĝinta ĉemizo. Surpiede li portas sandalojn.



— I-ru al Jo-ha-no! — diras sinjorino Marta elproksime rigardante en la vizaĝon de Jozefo; ŝi malrapide akcentas la silabojn. Tiel Jozefo komprenas, kapjesas. Kaj li ekiras. Surstrate li salutas neniun, kvankam certe li konas la vizaĝojn. Eble li eĉ scias, kiu estas kiu en la vilaĝo. La vilaĝanoj defore lin rekonas perokule, ja li paŝas tiel strange, ĵetante flanken la piedojn, brakojn. Kelkfoje Jozefo ankaŭ kantas por si, duonvoĉe.

Al Johano oni portis lignon por hejtado. Oni devas segi la trunkojn. La dommastro donas segilon al Jozefo kaj antaŭ ol foriri al la laborejo, li avertas sian edzinon: "De tempo al tempo ĵetu rigardon al la korto..." Sed superfluas la observado. Jozefo laboras kiel maŝino.

La flavinternaj akaciaj trunkoj unu post la alia kuŝiĝas sur la segilstablo-eŝafodo, ekploras la segilo, krake ekkrevas la krusto verdeta. Kiam Jozefo finas la segadon, li remetas la stablon en la lignejon kaj paŝas al la malnova, morta, enterigita lignoamboso por dishaki la segitajn trunkopecojn. Eksonas la vilaĝa sonorilego — estas tagmeze.

Jozefo forte kaptas la tenilon de la hakilego; ekĝemas la tero kaj la lignoamboso, splitoj flugadas. Poste la pecojn li portas en la lignejon, metas ilin unu sur la alian eĉ ĝis la plafono, ordeme.

La edzino de Johano donas al li tri teleregojn da manĝaĵo, la knabo avida enbuŝigas ĉion, kelkaj pecetoj eĉ elfalas sur la tablon. Kaj Jozefo dankeme ridaĉas.

**MARDE** sinjorino Marta veturas al la urba foirplaco por vendi. Ĝis la aŭtobushaltejo Jozefo portas surŝultre la du plenplenajn korbegojn. La aŭtobuso forveturas brue-polve, Jozefo reiras hejmen. Li muelas maizon, poste kuŝiĝas proksime al la korta palisaro kaj dormas. Posttagmeze li gapobservas la paserojn. Tiutage pli frue revenas la dommastro, ili kune miksas la supon por la porkoj. Vespere Jozefo staras ekstere ĉe la malfermita fenestro kaj de tie rigardas la televidon enĉambran. Bluetaj lumoj brilas sur lia vizaĝo. Somertempe li ofte staras tie eĉ dum horoj. Ĉion ajn li rigardas. Kaj li mansvingadas al la parolistino, foje-foje ankaŭ al la aktoroj.

**MERKREDE** Jozefo volas ankoraŭ dormi, sed pluvo lin vekas brue. Tra la breĉoj li vidas grizan kurtenon: el la nuboj senĉese inundas la akvo. La koton de la korto blekantaj anasoj tretadas. Jozefo iras al la kamero kaj distranĉadas urtikon. Dume li an manon pikas la kreskaĵo. La anasoj ĝoje-humide formanĝas la urtikon, Jozefo ricevas tasegon da lakto, kolbason kun pano. La pluvo ĉesas. Jozefo tamen ne bonhumoras, gapas nur antaŭ sin. Venas el la domo la mastro, hodiaŭ li ne iris labori. "Venu, Jozefo, ni riparos la tegmenton." Super la porkejoj

subenglitiĝis la tegoloj, ankaŭ la teniltrabetoj rompiĝis kelkloke. Jozefo levas dudek tegolojn samtempe, sed la mastro nur po unu portas ilin sur la eskalo. Ploras la malnovaj, rustaj najloj, martelo leviĝas, trabo vibras. La novaj tegoloj malfacile eniĝas en lokon de la iamaj. La mastro blasfemas, li lekas la fingron vunditan.

— Maa-ooo! — krias Jozefo ĝoje. Ĉar kiam malaperas la nuboj, ankaŭ lia humoro pliboniĝas. En sitelo li portas la rompitaĵn tegolojn al la rando de la ĝardeno, li ĵetas ilin sub la arbustojn. Tie li vidas raŭpon verdan, grandan, vilan. Li longe observas la rampon konvulsian de la vermo, nenion komprenanta. En la okuloj de Jozefo sidas fremdeco. Poste li distretas la raŭpon kaj iras reen, al la domo.

**ĴAŬDE** al la poŝtestro matene oni liveris karbon. Lia filino alvenas al Marta: "Ni bezonas Jozefon..." "Bone, Irena, prenu lin, sed vi donu al li manĝon multan." "Kompreneble, ni manĝigos lin, onjo Marta. Venu, Jozefo!..."

Jozefo sekvas ŝin. Sur la nova betontrotuaro li iras apude kaj rigardas al Irena. Liaj okuloj ĝojas. Nun brilas la suno. Apud iu domo kamparanino vendas flavajn pirojn. Jozefo kun natura movo prenas unu piron kaj mordas ĝin. La kamparanino jam krias — sed Irena mansvingas: "Lasu." Ŝi aĉetas kilogramon, pagas iom pli multe, ol ŝi devus — la kamparanino silentas.

La karbo estas ĝistalia nigra monteto, certe pezas almenaŭ tri tunojn. La poŝtestro montras al Jozefo, kie estas ilia kelo, poste li donas al la knabo sitelojn, ŝovelilon kaj per duonbrikoj li apogas la pordegon, por ke ĝi ne fermiĝu. Li reiras al la poŝtoŝtorejo, sed trafenestre li observas Jozefon. La junulo aperadas en la pordego, ĉiam pli nigras jam liaj nudaj ŝultroj, brusto, vizaĝo. Vagaj infanoj gapas lin, poste la varmego pelas ilin hejmen. Irena ĉiuhore donas al Jozefo unu piron kaj alportas ankaŭ la sodakvujon. La knabo ridaĉante trinkas, poste li ŝprucigas la akvon





sur la katon, kiu sidas sur la fenestrobreto. La besto kolerblove fuĝas, Jozefo ridas: —aa—aa—aa.

Estas malfrua posttagmezo, kiam li finas la laboron. La edzino de la poŝtestro metas teleregon sur delonge neuzitan lignotablon, kiu staras apud la enirejo de la kelo. Ŝi ne distranĉas la panon; la fingroj de Jozefo eniĝas en la molan, brunan internon, perdente li ŝiras la ŝelon de la pano. La kulerego elfalas el inter liaj fingroj. Kiam li finas la manĝon, alvenas la poŝtestro. "Vi ne povas iri hejmen tiel malpura, Jozefo!" — kaj el la legomĝardeno li alportas la

gumtubon porakvumadan. Jozefo dancas meze de la korto inter arĝentaj akvotradioj, la akvo batas lian korpon iom puriĝintan. Li kaptas la du restintajn pirojn kaj forkuras hejmen. Dumvoje, apud la kinejo li haltas, pisas al la muro, samtempe manĝas la piron.

VENDREDE antaŭtagmeze oni alliveras la brutonutrajn. El ŝarĝaŭtomobilo oni demetas pezajn sakojn. Ankaŭ la ŝoforo kaj liaj kunuloj loĝas en tiu ĉi vilaĝo, ili konas Jozefon kaj laŭte ridas, ridaĉas. "Kiam vi edziĝos, Jozefo...? Ĉu domon vi konstruos? Ĉu vi jam aĉetis frakon por la edziĝfestoj?" Jozefo ridas, elmontras sian dentkaron, laŭvice prenas la sakojn. Estas li, kiu enportas plej multe da ili.

Posttagmeze li iras al la fojnejo. Iuloke li jam distretis la fojnon, tie estas lia kaŝloko. Metante la kapon sur sian brakon, li tuj endormiĝas. Neniu scias,

pri kio li sonĝas. Sed alvenas la mastro, serĉas lin, krias. Jozefo kun dormemaj okuloj, ŝanceliĝante eliras. — Hi-am-aa...? — li demandas. La mastro nur mansvingas: venu! Traktoro kun tirĉaro bruas antaŭ la pordego. Jozefo sidiĝas en la tirĉaron, liaj brakoj pendas suben. La knabo ridetas. La traktoro polvon kirlante veturas, la vilaĝanoj aŭdas la ĝojkriegojn de la knabo. Sur la maizagro ili ŝarĝas la tirĉaron, laboras ĝis vesperiĝo. Poste la traktoro reveturas en la vilaĝon, oni subenĵetas la sakojn.

SABATE sinjorino Marta denove ekveturas al la foirplaco. Jozefo portas la korbegojn, metas ilin en la aŭtobuson. En la vilaĝo estas ega svarmo; en ĉiu tria korto oni konstruas novan domon. Kontraŭ la malnova tombejo elstaras el la tero multaj grizaj betonfundamentoj, ruĝaj brikmontetoj, ŝtonetpiramidoj. Ĉi-sezone Jozefo multloke estas necesa. Tagmeze li laboras jam en la tria korto. Ĉi tie oni devas levi alten betontrabojn. Desube tri viroj puŝas ilin supren, staranta sur la preta muro Jozefo sola tiras la ŝnuregon.

Survoje iras virinoj ridetantaj. Poste, sur la vojeto apud la tombejo aperas knaboj kaj knabinoj kun dorsosakoj. La vento flirtigas kolorajn tukojn. La grupeto iras al la vojo kondukanta surmonten. Jozefo staras sur la tegmento de duonpreta, fremda domo, rigardas al ili. Kaj mansvingadas — sed la grupo iras jam tro malproksime, ne aŭdas liajn kriojn. Post nelonge la knaboj kaj knabinoj malaperas inter la arboj.

Vespere la najbaro venas al la dommastro. Ĉe li oni malkonstruis la kokinejon; deprenis jam la tutan tegmenton kaj disbatis la lignajn murojn, sed la kvar kolonojn ili ne sukcesas eligi el la tero. "Terure ili pezas" — plendas la najbaro kaj palpebrumas al Jozefo. "Iru, Jozefo!" — diras sinjorino Marta; ŝi sidas ĉe la fenestro kaj kalkulas la hodiaŭan enspezon vendoplacan. "Am-mana" — respondas Jozefo. La lignaj kolonoj vere estas pezaj; dum multaj jaroj ili kvazaŭ radikiĝis en la tero. Jozefo albrakumas kaj iom post iom movante ilin, eligas ĉiujn kvar. La kolonoj kuŝiĝas surteren, kvazaŭ ili ĝojus, ke post tiom da jaroj ne plu ili devas stari. La najbaro prenas la ŝovelilon, per tero plenigas la kavaĵojn.

DIMANĈE la porkoj ne scias, ke estas dimanĉe. Nek la kokinoj, la anasoj. Ankaŭ hodiaŭ oni devas miksi porkosupon, tranĉi urtikon, mueli maizon. La manoj de Jozefo ĝis kubuto mergiĝas en la brano. Poste li purigas la bestojn. Post la tagmanĝo gastoj alvenas al la dommastroj. Jozefo hodiaŭ ne mansvingadas al ili, ne ridetas. Li aliras la prunaron, kvankam la prunoj ankoraŭ estas nematuraj. Iom li manĝas, poste li ĝuste volus iri al la fojnejo por dormi, kiam li rimarkas: surstrate iradas blankĉemize vestitaj homoj. Unue super la kortobariere li rigardas la amaseton kolektiĝantan antaŭ la kinejo, poste li iras al ili. Ankoraŭ ne alvenis la projekciisto kun la filmo; la gejunuloj atendas en grupetoj, la knabinoj ridetas, laŭte. Du soldatoj malfermas novajn kaj novajn bierbotelojn. "Ĉu vi trinkas, Jozefo...?" Ili restigas por li iom da biero funde de la botelo, Jozefo eltrinkas ĝin, sed lia vizaĝo grimaciĝas. Ne bongustas la biero. La soldatoj ridas.

Poste polve alveturas en eta aŭto la projekciisto, li malfermas la pordon. La maljuna kasistino lekas si-





an fingron. Jozefo almurigas sian dorson. Poste zumkrakas la sonorilo raŭka, oni brue entrotas en la salonon. Iu krias: "Jozefo, envenu...! Sinjorino, permesu lin eniri!"

Li jam ne havas seĝon, do sidiĝas sur la planko. Obtuziĝas la bruoj, sur iu muro subite aperas kolora bildo. Kavaliroj rajdas rapidege, sovaĝaj krioj tremigas la aeron. Ankaŭ Jozefo kriegas kune kun ili: "I-i-i-ja...! Ha-aaa-ji!" La publiko ribelas: "Kial kriegas tiu frenezulo...? Jozefo... certe li kriis! Elĵetu lin!"

Oni eligas lin el la salono, la larĝa pordo fermiĝas. Jozefo volus reiri tien, kie koloraj kavaliroj rajdegas sur la muro. Iom longe li staras antaŭ la pordo, aŭs-

kultas la internan muzikon — poste li ekiras hejmen. La gastoj jam foriris. "Kie vi vagis?" — demandas la dommastro — "venu, ni devas nutri la porkidojn.."

Nokte Jozefo longe maldormas. Sur la muro de la lignejo kavaliroj rajdas ventrapidege, cent hufoj tro-  
tas sur la planko —

LUNDE matene Jozefo vekiĝas, kaj iom dormeme li rigardas antaŭ sin. Tra la breĉoj de la muro de la lig-  
notenejo enbrilas la suno. Nun estas somere, do li ne sentas malvarmon. Sed li loĝas ĉi tie ankaŭ vintre; ti-  
am ĉiu breĉo estas glaciblovanta malamiko. Glaci-  
blovanta malamiko — — — — —



Karolo Piĉ:

## Ordeno de Verkistoj (Fragmentoj)

Novembra posttago. Tarda vespero. Horloĝmontriloj fale proksimiĝantaj al la dudekunua.

Super la Dominia Skvaro fride pintas la nubgratulo de la Kanada Imperia Komerco banko. Ĝiaj 120.000 kvadrataj futoj da vitrotabuloj kaj fenestroj triste glaŭkas nokten.

La 45 etaĝoj de la konstruaĵo estas senhomaj kaj dezertaj. En la kaptur-  
na centokdek dumetra alto de la supra observejo ja ankoraŭ poiradas kelkaj vizitantoj. Sed cetere la edificon vivigas jam nur gardistoj kaj jen kaj jen nok iu telefonistino.

Sur la 39-a planko troviĝas lokaloj de Masono & Masono. Lignoindustrio. Meblofabrikado. Paperejoj. Nenia mamuta entre-

preno. Malgraŭe tamen unu el la rad-  
doj kaj radetoj de la granda bizniso. Parto de konzerno kun filioj en Novjorko, Seatlo, Portlando

Losanĝeleso kaj Sanfrancisko. Ano de monopolo havanta latifundiojn en Brazilo, Alasko kaj la Nord-  
duetaj Teritorioj. Membro de unuiĝo kun oficejoj sur Bahamoj, Jamajko, Trinidado, Grenado kaj Barbadoso. Kaj kompaniano de internacia asocio kun reprezentejoj en Eŭropo kaj la tuta Suda Ameriko. Kirliĝantaj miliardoj....

Sed ... Jen ... Ie muĝas lifto. Apenaŭ aŭdeble. El apude sonas melodia tintado de televokilo. Velura virina voĉo respondas kaj admonas. Jes! Vi povas certi! Memkompreneble! Ples! Kontrollampoj blinkas ruĝe, blue kaj verdatre. Kaj la nubskraporo plenas de intensa kaŝa vivo.

(Ĉapitro 1.)

\* \* \*

Liza Moreo atente metas tablen grandformatan koverton, zorge prenas el ĝi bunte ilustritan kajeregon, kaj lante ŝovas ĝin al Georgo. Dorspaĝe.

Kaj la ĉefo de la firmao Masono & Masono ekas legi:

### BORSO DE HISTORIAJ MONUMENTOJ

Ĉu vi ŝercas taŭgan objekton por kultura aŭ artisma institucio? Ĉu vi bezonas kvietan lokon por sciencaj studoj kaj esploroj? Ĉion ĉi donos al vi la

### EKSPIARISTEJO EN LITOMIŜLO

Respektivaj aĉetuntoj bonvolu sin turni aŭ al la redakcio de la FLOROJ aŭ rekte al la Regiona centro de monumentkonservado kaj naturprotekto de la Orientbohemia regiono.

Dum du, tri minutoj Georgo Masono restis senparola, kiel se li gapus malplenen. Fakte li estis tiom





absorbita far la foto, dokumentanta la tekston.

Vekis lin erst la insista demanda "nu?" de Liza.

"Jes!" li deskuis dos si la nevideblan vualon.

"Tio ... " li serĉis vortojn "tio estas la plej bela donaco, kiun mi ricevis iam! Memkompreneble krom vi, Liza!"

Li haltis antaŭ ŝi.

"Ĉu vi emus fariĝi monaĥino?"

"Mi ... ?"

"Jes! Novicino de la Ordeno de Verkistoj!"

"Ĉu mi devus skurĝi min ... ?"

"Nur se vi volus delogadi iun ... !"

"Ĉu mi portus blankan robon? Kaj ĉu mi surhavis neĝean habiton kiel la mezepokaj abatinoj, ples!?"

"Vi povus surmetadi kaj demetadi ĉion, kion vi dezirus!"

"Do, inicu min!"

(Ĉapitro 2.)

\* \* \*

Kelkaj ombroj portas Amatan.

"Senviva ... morta ..." haste kuras flustro.

"Mem jam ombro ..." aŭdiĝas murmuro.

La tondro ludas fantoman funebran marŝon.

Georgo delire brakumas Lizan.

Ŝi ne moviĝas.

Nur ŝiaj pensoj ankoraŭ ŝvebas kaj kirliĝas.

"Foriri nun, kiam, finim, vi trafis ĝissojle de la feliĉo ..."

La koron de Liza plenigas senfina tristo ...  
despera nostalgio ...

"Rolando ..."

Georgo apenaŭ ŝin aŭdas.

"Rolando ... Trifoje li avertis nin ... Amatan ...  
min ... kaj Danan ... La vino estis venenita ..."

La vangoj paliĝas ... La manoj perdas forton ...  
Ankoraŭ unu alpremiĝo, febla kaj angora, kaj ... ĉu  
ĝis? ... ĉu adiaŭ? ... mankas vortoj ... restas jam nur  
larmoj ...

Lasta sorstreĉiĝo ... nok ...

Spasma skuiĝo ...

Kaj ...

"Senviva ... morta ..." haste kuras flustro.

"Mem jam ombro ..." aŭdiĝas murmuro.

"Ĥimero ... fantomo ..." la lipoj timas diri.

"Argilo ... polvo ... argilo ... polvo ..." la menso  
rifuzas kredi.

"A porta Inferi ..." iu ekklamas.

"Erue, Domine, animas earum ..." respondas  
voĉoj en tenebroj.

Kaj enambite iu ŝturmas.

"Kling kling kling ... klang ... kling kling kling  
... klang ..."

(Ĉapitro 37.)



**Kosma amo**, Josef Kohen-Cedek (1903). Originalaj poemoj. Jerusalemo: Sivron, 1986. 14p. Ilus. 15cm. Prezo: 6,30 gld.

**Kuracaj manĝaĵoj**, komp. Ŭeng Ŭejĝjan k.a. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 63p. Ilus. 18cm. Feniksa libraro. Receptaro de pladoj kun kuracaj ecoj. Prezo: 3,00 gld.

**Kurso de Andreo Cseh, La** (1929). Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1986 (6a eldono, parte reviziita). 148p. 21cm. Gvidlibro por instruantoj kun akompana materialo, i.a. koloraj bildoj, konversacia vortareto kaj la kajeroj "Konversacia literaturo". Prezo: 30,00 gld.

**Letriks-instrukcioj por Esperantaj komputorantoj**, R. Eichholz (1922) (Terminologia Centro de ISAE). Riverdale: Hammerlab Korporacio, 1986. 40 + 22p. 21cm. Versio 3,5 86-01-31. Prezo: 12,60 gld.

**Nekonato: La Zamenhofa Homaranismo** (represita el *Senacieca Revuo* 1959). André Caubel. Laroque: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1986. 22p. 21cm. Prezo: 1,80 gld.

**Nomenklature de ĝeneralaj ornamfloraj vegetaĵoj**, ĉefred. Zheng Ding-zhi. Guangxi/Guilin: Guangxi-a Botanika Instituto kaj Guilin-a Esperanto-Asocio, 1986. 101p. 18cm. Nomaro en la angla, latina, ĉina kaj Esperanto. Prezo: 6,00 gld.

**Politika raporto de Centra Komitato de KPSU al la 27a Kongreso de la partio**, Miĥail Gorbaĉov (1930). El la rusa trad. L. Novikova k.a. Moskvo: Eldonejo de Presagentejo Novosti (APN), 1986. 152p. 19cm. Prezo: 2,40 gld.

**Post la iel-tiela kompletigo**. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1986. 296p. Ilus. 22cm. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero 2-bis. 81 prizamenhofaj korespondaĵoj inter Ludovikito kaj Gaston Waringhien, aldonaj tiutemaj leteroj kaj dokumentoj, hospitala taglibro de Ludovikito kaj aperintaj recenzoj pri antaŭaj volumoj de la serio. Prezo: 37,50 gld.

**Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ' !; Dek du podie prezentataj monologoj kaj skeĉoj (tute sen ekzercoj kaj demandoj)**, Stefan MacGill (1948). Roterdamo (neindikita): Stefeto, 1986. 88p. Ilus. 21cm. Rakontoj kaj skeĉoj, ofte primovadaj, plenaj je vortoludoj. Ne por komencantoj. Prezo: 9,30 gld.

**Ŝta treba znati?**, S. Ĉoliĉ, F. Zvirac kaj K. Jakupoviĉ. Sarajevo: Elbih, 1986. 48p. 20cm. Informlibro pri Esperanto kaj la movado. Prezo: 6,00 gld.

**Tajĝiĉjŭan**. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. Ilus. 18cm. Feniksa libraro. Klarigoj por praktikado de la ĉina gimnastiko. Prezo: 4,80 gld.

**Urba oazo**, D. Mager (1954) kaj J. Gishron (1948). Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. Ilus. 15cm. Originalaj poemoj. Prezo: 4,80 gld.



**Tiel diris la majstro**, Huberto Rohden (1894-1981). El la portugala trad. Délio Pereira de Souza. Rio-de-Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1978. 218p. 20cm. Tria verko en la kvaropo "Saĝeco de la Evangelio". Prezo: 8,70 gld.

**Vojo al feliĉo, la**, Huberto Rohden (1894-1981). El la portugala trad. Délio Pereira de Souza. Rio-de-Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1984. 90p. 20cm. Studo pri la konsisto kaj atingebleco de feliĉo por fariĝi kompleta homo. Prezo: 6,90 gld.

**Wörterbuch Esperanto-Deutsch**, komp. Franz Okelmann. Bayreuth: La kompilinto, 1986 (neindikita). 318p. 21cm. Vortaro, ordigita laŭ la alfabeto ordo de vortoj anstataŭ radikoj. Taŭga por komencantoj. Prezo: 20,70 gld.

**Yeni bas layanlar için Esperanto**, William Auld (1924). Ankara: Türkiye Esperanto Derneğince Türkçeleş tirilmiştir, 1985 (neindikita). 31p. Ilus. 27cm. Rapidkurso elementa lernolibro. Prezo: 5,70 gld.

**Zamenhof and Esperanto**, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Sivron, 1986. 10p. 15cm. Prezo: 4,20 gld.

**MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA**, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!



## Kongresa Komitato

### 72a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Varsovio (Pollando)

**25a de julio — 1-a de aŭgusto 1987**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,  
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de LKK: p/a Pola Esperanto-Asocio,  
Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando.**

**La kongresa temo:** En la 72a Universala Kongreso kulminos la festado de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo. La Kongreso estos inaŭgurita la 26an de julio, precize cent jarojn post la tago, kiam en Varsovio aperis la Unua Libro de d-ro Zamenhof. La Estraro de UEA elektis por la Kongreso la temon "Esperanto — cent jaroj de internacia kulturo". La kongresa programo tial havos, pli ol kutime, festivalan karakteron. La organizantoj atendas, ke ankaŭ la fakaj asocioj atentu pri la kongresa temo en la planado de siaj kunvenoj.

**Kongresoj:** Kiel la 44a UK en la jubilea Zamenhofa Jaro 1959, ankaŭ la 72a UK okazos en ĉiuj salonoj kaj salonegoj de la impona — ĵus renovigita — Palaco de Kulturo kaj Scienco. Ĝia ĉefsalono povas sidigi nur iom pli ol 3200 personojn, sed ni jam traktas kun la Pola Televido pri samtempa spektblo de la Solena Inaŭguro sur grandaj ekranoj en pluraj samdomaj teatrejoj kaj kinejoj kaj eventuale ankaŭ ekstere sur granda placo antaŭ la kongresejo.

**Loka Kongresa Komitato:** LKK funkcias jam de pli ol duona jaro sub la gvido de S. Świstak, iama estrarano de UEA kaj prezidanto de la pola Jubilea Komitato. En la LKK kunlaboras ankaŭ pluraj aliaj internacie konataj polaj esperantistoj: A. Pettyn, R. Dobrzyński, E. Siurawska, K. Pienkiewicz ktp. Pro la atendata grandeco de la Kongreso, en Varsovio oni kalkulis pri kelkaj centoj da helpantoj al la LKK, kiuj jam anoncas sin el la tuta lando.

**Loĝado:** De post majo 1986 LKK traktas kun la plej granda pola vojaĝagentejo Orbis pri la loĝigo kaj ekskursoj. Rezervitaj por la kongresanoj estas pli-malpli ĉiuj disponeblaj ĉambroj en la hoteloj de la urbocentro (ĉ. 3200 litoj) kaj kelkaj miloj da lokoj en studentaj domoj rande de la urbo. LKK nun traktas ankaŭ kun alia vojaĝagentejo, kiu prizorgos karavanojn el la orienteŭropaj landoj. Ni planas, ke la Dua Bulteno, kiu enhavos ĉiujn detalojn kaj mendojn, aperu fine de januaro 1987.

**Internacia Kongresa Universitato:** La 40a sesio de IKU okazos kadre de la 72a UK. Universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ samrangaj lernejoj, estas invitataj proponi prelegon antaŭ la 20a de januaro 1987 al la Komisiono pri IKU ĉe ties sekretario prof. Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie-Mellon University, Pittsburgh PA 15213, Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de prelegtitolo kaj -resumo, bibliografio kaj biografieto. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝkostojn.

**Aliĝado:** Aliĝilo estis sendita kun la septembra numero de la revuo *Esperanto*. Aliĝiloj haveblas ĉe la kongresaj perantoj, kies adresoj troveblas en la Unua Bulteno, ĉe la konstanta adreso kaj ĉe LKK. La kotizoj varias depende de la lando de la aliĝanto (la grupigo troveblas sur la aliĝilo). Oni notu, ke ĉiuj kotizoj plialtiĝos la 1-an de januaro 1987. Partprenontoj en la 43a Internacia Junulara Kongreso rajtas senpage aliĝi al la 72a UK, kondiĉe ke ili jam pagis la aliĝkotizon de IJK kaj estas malpli ol 26-jaraj je la 1-a de januaro 1987.

**Perantoj:** Diference de la informo en la Unua Bulteno, Svedio havas novan peranton: s-ino Lisbeth Andréasson, Södra Rödrum pl 445, 242 00 Hörby.



# Kalendaro

En la marta numero de *Esperanto* venontjare, ni publiki-  
gos plenen kalendaron por la cetero de la Jubilea Jaro,  
t.e. de aprilo ĝis decembro. **Informoj por la kalendaro**  
**atingu nin plej malfrue la 1-an de marto. Dankon!**

## Decembro-Januario

- 27-03: Internacia Vintroferio, Domo Montana, St. Mag-  
dalena, Gsies, Suda Tirolio, Italio (Eki Woite, An  
der Kirche 33, D-6115 Münster, FR Germanio)
- 26-03: Vintro-Feriado: Promen-skiado kaj natur-scienco,  
La Chaux-de-Fonds, Svislando (Kultura Centro  
Esperantista, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-  
Fonds)
- 27-03: 30a Internacia Seminario, Köln (Kolonjo), FR Ger-  
manio (Thomas Pusch, Am Schwertberge 23, D-  
2845 Damme)

## Januario

- 03-10: Internacia Vintroferio, Domo Montana, St. Mag-  
dalena, Gsies, Suda Tirolio, Italio (vd. supre por in-  
formo, aliĝoj)
- ekde 04: Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo en Byd-  
goszcz, Pollando (BET "Esperantotur", str. M. Sklo-  
dowskiej-Curie 10, PL-85094 Bydgoszcz)
- 08-12: 52a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio,  
Masterton, Nov-Zelando (J. Major, P.O. Box 330,  
Wellington)

## Februaro

- 01-15: Renkontiĝo de Esperanto-instruantoj, Bydgoszcz,  
Pollando (BET "Esperantotur", str. M. Sklo-  
dowski-Curie 10, PL-85094 Bydgoszcz)
- 08-15: Junulara konkurso de Esperantaj poezio kaj kan-  
zonoj, Bydgoszcz, Pollando (BET "Esperantotur"  
— vd. supre)
- 21-28: Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno, Sara-  
jevo, Jugoslavio (Esperanto-Ligo Sarajevo por 28a  
IFES, YU-71000 Sarajevo)
- 26-01: Bohemia Esperanto-Festo, Ĉeĥoslovakio (CE-  
DOK-Kongresa Fako, Na prikop 18, CS-11135 Pra-  
ha 1)

## Marto

- 13-15: Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, Leipzig,  
Germana DR (Kulturbund der DDR, Organiza Ko-  
mitato de IFER '87, Käthe-Kollwitz-Strasse 115,  
DDR-7010 Leipzig)
- 20-22: Jarkonferenco de SAT en Britio, Swanwick, Der-  
byshire, Anglio (SATEB, 29 Farrance Road, Chad-  
well Heath, Essex RM6 6EB, Britio)
- 20-22: 3a Internacia Renkontiĝo "Ivan Flanjak", Osijek,  
Jugoslavio (Komunuma konferenco de KEL, pk  
27, 54001 Osijek)
- 20-23: 28a Hungara Esperanto-Kongreso, Budapeŝto,  
Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, pf 193, H-  
1368 Budapest)
- 20-23: Jubilea Internacia Teatra Renkontiĝo, Budapeŝto,  
Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, pf 193, H-  
1368 Budapest)
- 20-23: 2a Seminario pri Publika Klerigado, Budapeŝto,  
Hungario (Klerigista Grupo de Budapeŝta Komita-

to, pf 153, H-1443 Budapest)

## Aprilo

- 03-05: Jubilea Esperanto-Kongreso, Amersfoort, Neder-  
lando (C. Bossong-Singer, Floraplein 23, NL-5644  
JS Eindhoven)
- 03-05: Junulara Esperanto-Renkontiĝo, Gödöllő, Hunga-  
rio (Hungara Esperanto-Asocio, Departamenta  
Komitato Pest, Szamuely u. 47 fsz. 3, H-1093 Bu-  
dapest)
- 03-09: 5a Internacia Metodika Seminario, Pisanica, Bul-  
gario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Bo-  
tev 97, BG-1303 Sofia)
- 10-13: Jubilea Esperanto-Kongreso, Stockholm, Svedio  
(Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-11138  
Stockholm)
- 17-20: Jubilea Brita Esperanto-Kongreso, Abergavenny,  
Kimrujo (W. Jenkins, 14 Gelligaled Road, Ystrad  
Rhondda, Mid Glamorgan, Britio)
- 17-20: Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo,  
Losser, Nederlando (Arjen-Sjoerd de Vries, de  
Bongerd 8, NL-9801 As Zuidhorn)
- 17-24: 3a Printempa Semajno Internacia, Rastatt, FR Ger-  
manio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-str. 2a, D-  
4418 Nordwalde)
- 65a Germana Esperanto-Kongreso, Rastatt (infor-  
mo, aliĝoj kiel supre)
- 17-24: 2a Pedagogia Seminario de Unuiĝo Franca por  
Esperanto, Lyon, Francio (UFE-Pedagogia Semi-  
nario, rue Major-Martin 7, F-69001 Lyon)
- 19-25: Internacia Renkontiĝo de Infanoj, Grésillon, Fran-  
cio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)
- 24-26: 6a Szczecin-a Esperanto-Printempo, Szczecin, Pol-  
lando (PEA-Szczecin, skrytka 14, ul. Armil Czer-  
wonej 13-14, PL-70358 Szczecin)
- 24-26: Amikeca Renkontiĝo de Esperantistoj, Pécs, Hun-  
gario (Hungara Esperanto-Asocio, Departamenta  
Komitato Baranya, pf 2, H-7601 Pecs)

## Majo

- 01-03: 28a Unuamaja Renkontiĝo de Jugoslavia Espe-  
ranto-Junularo, Zavidovići (URJEJ, D. Ozme 7/iv,  
YU-71000 Sarajevo)
- 08-10: 82a Skota Esperanto-Kongreso, Coodham Confe-  
rence Centre, apud Kilmarnock (P. Harvey, 51  
Morrison Avenue, Stevenston, Ayrshire, Skotlan-  
do)
- 08-10: Zamenhof Internacia Pacmarŝo, Veröcemaros,  
Hungario (Hungara Esperanto-Asocio, Depart-  
amenta Komitato Pest, pf 153, H-1443 Budapeŝto)
- 16-22: 39a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso, Ka-  
towice, Pollando (39a IFEF-kongreso, Slaska  
DOKP, Al. Różdzieński 1, PL-40202 Katowice)
- 22-24: 29a Kultura Semajnfino, Kardinal-Wendel-Haus,  
Homburg/Saar, FR Germanio (Sarlanda Espe-  
ranto-Ligo, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

## Junio

- 05-09: 79a Franca Kongreso de Esperanto, La Gaillarde  
apud Frejus-St.-Raphael, Francio (Esperanto,  
Tour Vadon A, F-83700 Saint-Raphael)
- 19-21: 22a Jugoslavia Esperanto-Kongreso, Banjaluka,  
Jugoslavio (22a JEL-kongreso, D. Ozme 7/iv, YU-  
71000 Sarajevo)



● **Israelo:** Post dumonata klopodo, s-ro Nahum Blonstein finfine ricevis subtenon de la Eduk-Ministrego de Tel-Aviva Distrikto por starigo de ekspozicio tie pri Esperanto kaj la (jam-okazinta) Internacia Junulara Kongreso en Neurim. Li deĵoris ĉe la Ministreja enirejo dum du tagoj, kie preterpasis centoj da instruistoj kaj administrantoj, kaj ricevis kvardekon da petoj por plia informado.

● **Argentino:** La 28an de septembro, trideko da Esperanto-kursanoj en Belgrano decidis fondi novan Esperanto-grupon "malferman al ĉiu honesta kaj sincera persono". La grupo, ŝajne principe, havas nek estraron nek statuton nek kotizon. Se vi interesiĝas pri tiu ĉi ekzemplo de praktika anarĥismo, vi povas skribi al "Amigos de Esperanto", Belgrano 6036, Argentino.

● En la argentina urbo Rosario, sub la aŭspicio de "Biblioteca Pop. Estimulo al Estudio" kaj en ties sidejo, komenciĝis nova Ĉe-kurso sub la gvidado de s-ro Enrique Kohei kun 33 lernantoj, kiuj volas kontakti kun Esperantistoj en aliaj landoj, precipe tiuj kiuj ne parolas la hispanan. Skribu al: Curso de Esperanto, Biblioteca Pop. Estimulo al Estudio, Av. Alberd 830, 2000-Rosario, Argentino.

● **FR Germanio:** Komence de Septembro okazis kvartaga Esperanto-kurso en Nikolaus-von-Weis Gimnazio en Speyer. Partoprenis 24 gejunuloj sub la gvido de Franz-George Rossler. Aparte notinda decido de la kursanoj estis fariĝi "simpatiantaj membroj" de nova Esperanto-grupo en Ruando, kien ili sendis kotizojn kaj Esperanto-materialojn. Ruando estas "Gemela Ŝtato" de la koncerna germana kantono.

● **Brazilo:** La Brazila radio-programo "Noticoj pri Esperanto" antaŭnelonge trapasis sian unuan datrevenon. La programo (portugallingva, kun Esperantaj enkonduko kaj fermo) konsistas el mallongaj informoj pri la Esperanto-movado. Krome, dum septembro okazis serio de Esperantaj mu-

zikprogramoj. Salutkartoj al la redaktistaro estus tre bonvenaj: Brasilia Super-Radio FM, Eixo Monumental Box 3 Torre TV, 70.000 Brasilia (DF), Brazilio.

● **Hungario** Nova pilgrimejo por hungaraj esperantistoj fondiĝis la 4an de oktobro en la urbo Szekszárd. Temas pri memortabulo sur la domo, en kiu troviĝis la presejo de *Lingvo Internacia* — la torĉportanto post la malapero de *La Esperantisto* — en la jaroj 1901-1904. La eldoninto, Paul Lengyel (1868-1932) estis unu el la plej eminentaj fruaj verkistoj kaj aktivuloj en Esperanto.



● **Blinduloj:** La dudekjara porblindula organizo "Agado E3" intencas konstrui okulklinikon en Hindio, kie vivas centmiloj da kataraktuloj facile operacieblaj. Informojn donas kaj brikojn dankoplene akceptas la iniciatinto, Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.

● **Perkomputila tradukado:** Ni jam kelkfoje raportis pri la projekto DLT de la programarkompanio BSO en Utrecht, Nederlando, en kiu oni evoluigas sistemon por perkomputila tradukado uzante modifitan Esperanton kiel interlingvon. Tiu projekto nun el-

● **Svedio:** La sveda poŝtinstanco nun finfine reklamas libreton pri per-Esperanta korespondado, kiu eldoniĝis antaŭ du jaroj. Kolora flugfolio pri tiu kaj tri svedlingvaj libretoj nun troveblas en ĉiu poŝtofocejo; dume, duono de la 5.000-ekzemplera eldono estas jam forvendita.

● **Aŭstrio:** Verŝajne ne estas vaste konate en la Movado, ke en la instituto pri Lingvistiko en la Universitato de Innsbruck regule okazis jam de 1948 oficialaj kursoj en Esperanto. La prizorganto nun estas prof. Helmann Ölberg, kiu mem kiel studento lernis Esperanton per tiuj kursoj. Ankaŭ la interlingvistikaj fakoj de la instituta biblioteko estas tre bone ekipita per libroj kaj gazetoj, kaj ties katalogo estas preparata. Kursdetaloj haveblas kontraŭ kopi- kaj sendokostoj de prof. Ölberg, Institut für Sprachwissenschaft, Universität, Innrain 52, A-6020 Innsbruck, Aŭstrio.

● **Pollando:** Dum 80 jaroj ekzistis iu aktiva Esperanto Asocio en la pola urbo Ĉeŝtoĥovo; la datreveno mem okazos en la Jubilea Jaro, kaj jam lokaj aktivuloj faras planojn por soleni sian propran jubileon. Unu grava ero estos granda ekspozicio, memore al tiu kiu okazis en Ĉenstoĥovo en 1909, kaj kiun vizitis ĉ. 100 mil personoj. Oni ankaŭ planas diversajn aliajn solenaĵojn, inkluzive nomi unu popolernejon "Zamenhof" kaj unu urboparkon "Esperanto", kaj plurajn kulturajn spektaklojn.

donas libroserion pere de la lingvistika fakeldonejo Foris, kaj la unua volumo aperis en aŭgusto: *Word Expert Semantics: An interlingual knowledge-based approach* (red. B.C. Papegaaĵ, A.P.M. Witkam kaj V. Sadler). La libro klarigas, kiel en DLT oni solvos la malfacilan problemon pri dubsenceco en tradukota teksto. Notinde estas, ke pro la multlingveco de la prilaborata DLT-sistemo, montriĝis oportune realigi tiun ege komplikan procezon nur po unufoje, do ĉiam en la interlingvo. Tiel la libro grave kontribuas ankaŭ al la aplika flanko de esperantologio. Ĝi haveblas de la Libroservo de UEA kontraŭ 57,00 gld.



● **Muziko:** La prezidanto de Muzika Esperanto-Ligo (MEL) atentigas, ke la Ligo antaŭnelonge decidis klopodi organizi diversnaciajn Esperanto-ĥorojn, tiel ke ĉe la Varsovia Kongreso kunkantos tuta aro da ĥoroj. Kante-muloj kiuj jam partoprenas lokajn ĥorojn do kontaktu lin (Dimitr Terziev, Milin Kamak 58, BG- 1421 Sofia, Bulgario) se vi interesiĝas pri kunlaboro. Ankaŭ menciindas la MEL-revuo *Muziko*, kiu bonvenigas informojn kaj artikolojn de esperantistaj muzikistoj kaj muzikemuloj.

● **Medicino:** Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) bonvenigas ne nur kuracistojn aŭ medicinistojn, sed ankaŭ stomatologojn, dentkuracistojn, bestokuracistojn, farmaciistojn, flegistojn, medicinajn teknikistojn k.a. Membroj ricevas *Medicina Internacia Revuo*, kiu eldoniĝas dufoje jare (en junio kaj decembro, ĉ. 40-paĝa). UMEA nepre deziras kunlabori kun esperantistaj kuracistoj tutmonde; por pliaj informoj turnu vin al d-ro S. Yamazoe, 4-8-9 Iwagami-mati, Maebasi-si, 371 Japanio.

● **Bibliotekistoj:** Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio baldaŭ komencos la trian jaron de sia ekzisto. Inter la servoj, kiujn ĝi proponas al ĉiuj esperantistoj, estas la jenaj: terminologia servo pri bibliotekiko; konsila servo por esperantistoj kiu devas prizorgi Esperanto-bibliotekon; prilibra servo por helpi al tiuj, kiuj serĉas librojn malfacile akireblajn; kaj ĝia *Biblioteka Bulteno*, kiu aperos kvarfoje jare. Interesatoj turnu sin al la ĝenerala sekretario Geoffrey King, Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britio, aŭ al la nord-amerika sekretario Doug Portmann, P.O. Box 124, New Martinsville, WV 26186, Usono.

● **Esperanto-Muzeo:** La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Austrio, ludas gravan rolon en la informado pri Esperanto. Ĉiun jaron venas tien miloj da homoj el la tuta mondo, kiuj grandparte ne estas esperantistoj. Tial la Muzeo bezonas ĝisdatajn nacilingvajn informilojn pri Esperanto, ĝiaj ecoj, kaj la diversaj landaj organizaĵoj. Utiligu do la propagandajn eblecojn de la Muzeo per regula sen-

dado de kvalite bona informmaterialo al: Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Hofburg, A-1010 Wien, Aŭstrio.

● **Entomologio:** Al multaj objektoj ĝis nun honoritaj per nomado laŭ Esperanto, pasintjare aldoniĝis iu ĉina skarabspecio, *Gergithus esperanto*. Kiel distingan markon ĝi posedas kvin verdajn punktojn, aranĝitajn stelforme. Anglalingva priskribo troveblas sur p.138 de *Economic Insect Fauna of China*, Science Press, Beijing, 1985, kaj ĉinlingva sur p.122 de la sama eldono.

● Respondekas pri la nomo de tiu specio la veterana ĉina esperantisto kaj entomologo Io Chou, profesoro ĉe Nordokcidenta Agrokultura Universitato en Shaanxi-provinco. La loka Yangling-a Esperanto-Asocio fondiĝis pasintan decembron, kaj aperigis ĉijare Esperantan verkon de prof. Chou, *Ĉinio Marŝas en Insekta Mondo*. Yangling estas efektive konata en Ĉinio pro ĝia koncentriĝo de agrokulturaj institutoj kaj universitatoj. Tiuj, kiuj deziras kontaktojn, skribu al Yangling-a Esperanto-Asocio, N.W. Agr. Univ., P.O. Box 55, Yangling, Shaanxi, Ĉinio.

● **Biologia Nomenklatur:** Seminario pri Nova Biologia Nomenklatur okazis la 22-23ajn de aŭgusto en Kulturo Centro Esperantista, la Chaux-de-Fonds (Svislando). Oni nun akceptis 104 NBN-nomojn, dum 13 listoj da pliaj nomoj atendas taksadon de

NBN-komisionoj. Teksto pri enkonduko kaj akceptigo de novaj nomoj haveblas de la Asocio por Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout, Belgio.

● **Tradukreto:** La Internacia Tradukreto (vd. *Esperanto* 1986, p.91) rapide disvastiĝas. Jam fondiĝis kvar naciaj asocioj en Ĉinio, Hispanio, Portugalio kaj Francio. Inter aliaj celoj, oni intencas starigi kursojn pri tradukado, utiligante tekstojn pri diversaj teknikaj temoj; progresigi laboron pri teknikaj vortaroj per enspezoj de komerca tradukado; pretigi ĝisdatajn teknikajn informojn por nacilingvaj revuoj kaj gazetoj; kaj varbi novajn kunlaborantojn. Kontaktu: Claude Bodson, CMIA, Montigny en Cis, F-59225 Clary, Francio.

● **Korespondemuloj:** Venis novaĵo, ke Koresponda Servo Mondskala lastatempe ricevis sian 500an novan aliĝinton en 1986: 10 elcenta kresko kompare kun la antaŭa jaro.

● **Kontraŭfumantoj:** La bulgara entrepreno Ekonomia Direkcio "Globus" anoncis, ke ĝi nun komercas specialajn cigaredojn "Antitab". La cigaredoj enhavas ne tabakon sed drogherbon, kiu kaj mildigas la nervan krizon, kiun povas senti fumantoj pro fumĉeso, kaj malagrabiligas la guston de tabako mem. Kolora flugfolio en Esperanto haveblas de la entrepreno ĉe N. Rilski 32, BG-1000 Sofia, Bulgario.



**Universitato-kursoj:** Supre staras la partoprenantoj en la 17a Somera Kursaro ĉe San Francisco State University, Kalifornio, Usono (30/6-18/7, 1986). La kursojn organizis de la komenco Cathy Schulze, nova honora membro de UEA.



**El Irano** deziras korespondi:

F-ino Farzane Sanaye, 356, Block 1, Nabshe Pedar-sani, Serahe Samangan, Narmak, Tehran;

f-ino Parinaz Ferdosi, Dare sevom, Daste rast, K. Koliyayi, K. Gahandari, Taghatoe Kamarbandi, Kh. Zob-ahan, Karaj-31357;

s-ino Behgat Dolat-shahi, 5 K. shadi, Kh. Homa, Simetry Golha, Kh. Mohamed Ali Jenah, Tehran-14;

s-inoj Shohre Etminan kaj Parvin Erfani, 67, 29 Shargi, Golnaz Ghonubi Sadegieh (Arya-shahr), Tehran-14518;

F-ino Roza Taher-shams, Dare sevom. Daste rast, K. Shadid, Keshai, Kh. Nownahalan, Hasanabad Zargande, Gholhak, Tehran-19166.

**Mezaĝulan korespondadon** tutmondan deziras s-ro Lubanzadio Nao Nzoau, Esperanto-klubo, B.P. 827, Kisangani, Zairio.

**Tarifo:** Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bonvolu vidi la duan kovrilan paĝon.

**Jubilea Esperanto-kalendaro** tolaĵa, ĉ. 30 × 40 cm., haveblas kontraŭ 4 irk-oj de Stanislewo Rynduch, Hauptstr. 33. DDR-9701 Reumtengrün, Germana DR.

**30-jara industriisto** korespondus kun junulino. Apartat 2897, Barcelona, Hispanio.

**Deziras korespondi** kun esperantistoj de la tuta mondo pri literaturo, folkloro, florkulturo, fotografio Karim Saripov, str. Burovnikov 2-1, pos. Pridoroĵnij, Ĝurjev SU-266412, Sovet-Unio.

**Universitato** studento, 25-jara, deziras korespondadon pri kuracarto kun samfakuloj; ankaŭ, kiel respondeculo de Esperanto-klubo, dankeme ricevus ĉiajn pedagogiajn materialojn, aparte la Junulkurson plus Suplementon de SAT-Amikaro. Skribu al: s-ro Lukolama Lufimpu, Esperanto-klubo, B.P. 827, Kisangani, Zairo.



**Nova Esperanto-gastejo** en la nord-okcidento de Anglujo bezonas kuiristo/prizorganton. Tiu ricevos loĝigon kaj salajron. La ses monata provperiodo komenciĝos en aprilo 1987. Bonvolu skribi al Mary Davies, Esperanto Hotel, Oxcliffe Road, Heysham LA3 1PS Britujo.

Ĉu ekzistas poŝtartistoj en Esperantujo? Ĉu ekzistas Esperantistoj en Poŝtartujo? Ŝatus kontaktiĝi: Herbert Ashe, 1614 Postoffice St. No.1, Galveston, Texas 77550, Usono.

## Neologoj

**BÉLA BERCELI (1905-1986)**, dum pli ol 60 jaroj unu el la plej konataj esperantistoj en la hungara movado, enteriĝis la 5an de septembro en Budapeŝto. Ekde 1922, kiam kune kun sia fama frato Vilmos Bleier li fondis laboristan Esperanto-grupon en Újpest, li aktivadis en la Hungara Esperantista Societo Laborista kaj poste en Hungara Esperanto-Asocio, kies ĉefsekretario li estis dum dek jaroj.

**RENÉ BASTONG (1937-1986)**, kasisto-sekretario de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, tragike mortis la 6an de novembro en Parizo, Francio, post du monatoj de senkonscio. En septembro ĉi-jare lin trafis terorista bombo en la franca ĉefurbo.

**FELICE BERTOLETTI (1909-1986)** mortis la 17an de septembro en Milano, kie li estis delegito kaj fakdelegito pri mekaniko.

**WILLIAM DALE BROWN (1929-1986)** forpasis la 13an de aŭgusto en Sanfrancisko, Usono, kie li estis fakdelegito pri amatora teatro.

**ARTHUR CAPELL (1902-1986)**, elstara oceania lingvisto kaj antropologo, mortis la 10an de aŭgusto en Sydney, Aŭstralio. Siatempe, li estis membro de la redaktaj komitatoj de *La Monda Lingvo-Problemo* kaj de ties posteulo, *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*.

**BLANCHE CLAVIER (1901-1986)** forpasis la 31an de julio en Lyon, Francio. Ŝi estis tre aktiva loka esperantisto ekde 1933, kaj la aktuala honora prezidanto de Esperanto-Centro de la Lyon-a Regiono.

**YOK SIANG KHO (1897-1986)**, unu el la plej fruaj esperantistoj en Indonezio (li eklernis Esperanton en 1925), mortis la 5an de julio en Jakarta.

**MARIA KRAUSOWA (1898-1986)** forpasis la 18an de oktobro. Honora membro de Pola Esperanto-Asocio, ŝi estis aktiva Esperanto-instruisto ekde 1921. Plurjare ŝi plenumis postenojn en la estraroj de PEA, kaj organizis multajn ekspoziciojn, kunvenojn k.s.

**ANDRÉE ORSOLINI (1920-1986)** forpasis la 7an de septembro, en Charleroi, Belgio. Ŝi estis dum multaj jaroj ĉefdelegito de UEA. Aparte menciinda estas ŝia multjara redaktado de la franclingva informgazeto *Esperanto en Marche* ("Esperanto progresanta").

**HERIBERTO RODOLFO REICHA (1911-1986)**, delegito kaj fakdelegito pri arkitekturo, mortis la 21an de aŭgusto en San Carlos de Bariloche, Argentino.

**ERNST RIXNER (1909-1986)**, multjara Esperanto-instruisto kaj aktivulo, forpasis la 8an de julio en Vieno, Aŭstrio, kie li estis fakdelegito pri instruado.

**ELSA INÉS SOLÍS (1909-1986)**, delegito kaj fakdelegito pri muziko en Venado Tuerto, Argentino, forpasis tie la 10an de julio.

**JOZEF VAN GULCK (1901-1986)**, honora prezidanto de Skolta Esperanto-Ligo, forpasis la 29an de oktobro en Wommelgren, Belgio.



## Perkomputila tekstoprilaboro



Scienca Eldona Centro


Aperis ĵus la plej ampleksa projekto de Scienca Eldona Centro: 336-paĝa libro pri tekstoprilaboro komputila. Ĝi prezentas 21 studojn pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj el Ĉinio (Ouyang), Francio (Janot-Giorgetti k.a.), FR Germanio (Maas), Germana DR (Meier k.a.), Hispanio (de Sopeña), Hungario (Gordos k.a.), Japanio (Niŝida), Nederlando (Witkam, de Kat), Pollando (Jassem k.a.) kaj Usono (Sherwood). La artikoloj estas ordigitaj laŭ kvar sekcioj: Parol-prilaboro, Aŭtomata lingvo-analizo, Perkomputila tradukado kaj Komunikado inter homo kaj maŝino.

*Perkomputila tekstoprilaboro*, redaktis Ilona Koutny. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj pri la aŭtoroj kaj 10 paĝoj de resumo en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld. plus sendokostoj. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

## 6a libro en la ĉu-serio!

# Ĉu rakonti novele?

de  
**Johán  
Valano**



Jano Karál, nia obstina konato el la aliaj rakontoj, plian fojon solvas dum atentostreĉaj aventuroj aron da krimaj enigmoj en la plej nova novelaro de Johán Valano.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Prezo 370 BEF (por Belgio + 6% AVI) + afranko, aŭ ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo 21,00 gld + sendokostoj. 144 paĝoj. 21 × 14,8 cm. ISBN 90-71205-10-X.

Aŭdu la voĉon, kiu ravis en Pekino!

## JOËLLE RABU:

### *Omaĝo al Veselin Damjanov*

Stereofona disko, 45 t/m, kun la kantoj "La vivo rozas" kaj "La valso patrina". Vancouver, B.C: Goldrush Records GAS 111, 1986. Prezo: 6,00 gld. plus sendokostoj. (Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj).

Ĉu vi ne sukcesis havigi ĝin en Pekino?

La Libroservo de UEA rezervis por vi stokon de

## Filatela tutaĵo de la 71a UK

La bela multkolora koverto havas surprisitan poŝtmarkon, kongresan emblemon kaj, dorse, klarigon en la ĉina, angla kaj Esperanto.

Prezo: 9,00 gld. por 10 ekzempleroj (minimuma mendokvanto).

Triona rabato ekde tri dekoj.

**L' Esperanto dans l' enseignement:** Dro Pol Denoël. 30 p. 23 cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 BF.

**Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. Prezo: 250 BF. Kaseto: 150 BF.

**Corrige des exercices:** 80 BF.

**Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj:** kun surprisita stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakaĵo de 50 folioj kaj 50 koverto: 145 BF.

**Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto:** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. Prezo: 25 BF.

**Gluafiŝo: Mi amas (koro) Esperanto-n 1887-1987:** Formato 10 × 30 cm. Verda preso je blanka gluafiŝo. La koro estas en ruga koloro. Prezo: 70 BF.

**Novjaraj gratulkartoj:** kvar diverskoloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj: Esperanta, la franca, nederlanda, angla kaj germana. Prezo: 60 BF.

**Gluetikedoj Esperanto 1887-1987:** Orkolore presita. Uzeblaj sur korrespondadoj, ktp. Prezo de koverto kun 100 gluetikadoj (minimuma mendokvanto): 100 BF.

**Sunŝirmilon Esperanto 1887-1987:** Blanka preso sur verda fono. 10 × 130 cm (por aŭto); Prezo: 150 BF.

**Ŝlosilrington Esperanto 1887-1987:** Orkolore presitan. Haveblan en diversaj koloroj: blua/flava/ruĝa/blanka kaj verda. Prezo: 40 BF.

**Kelkaj floroj Esperantaj:** (1903). A.J. Witteryck (1865-1934). Agrablaĵ legajoj kun multaj ilustraĵoj. 1985 (2a eld.). 24 cm. 21 cm. Represo de ŝerclibreto. Prezo: 80 BF.

**Officiële situatie van het Esperanto onderricht in de wereld:** (1985). German Pirlot. (1943). El Esperanto en la nederlandan. 1985. 36p. Grafikaĵo. 21cm. Ĝisdatigita eldono (nov. 1985) de Oficiala situacio de la Eo-instruado en la mondo. ISBN 90-71652-01-7. Prezo: 100 BF.

**Mendu ĉe Libroservo de UEA, Libroservo de FLE, Libroservo de UFE,** ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo: Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK. Belgio. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj. Eldonejo & Librejo Sonorilo estas registrita (rekonita) asocio, kaj estas membro de V.B.V.B. kaj de V.U.N.B. Esperantistoj kiuj loĝas en la norda parto de Belgio (Flandrio) povas mendi siajn Esperantajn librojn ĉe normala (oficiala) Librejo!



# **KCE** KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

**DUM LA TUTA JARO JE DISPONO DE  
ESPERANTO-GRUPOJ KAJ KLUBOJ**

- junuloj
- triaĝuloj
- blinduloj
- handikapuloj
- religiuloj
- fervojistoj
- sportemuloj
- biciklantoj
- piederantoj
- natur-amikoj
- familioj kun infanoj

**Petu detalajn informojn:**

**Kultura Centro Esperantista**

**Pf. 771**

**CH-2301 La Chaux-de-Fonds**

tel. (el eksterlando) + 41 39 26 74 07

tel. (el Svislando) 039 26 74 07

## **ESPERO POR SENESPERA MONDO:**

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: *INTERNACIA BIBLIO-MISIO*, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

## **La Edinburgh Prelegoj pri Mensa Scienco**

**de Thomas  
Troward**

**mortinta divizia juĝ-  
isto, Punjab, Hindio**

El la amaso de religiaj libroj en Esperanto, la verko de Thomas Troward estas la sola, laŭ mia scio, kiu traktas la diferencon inter la indukta kaj dedukta rezonado, kaj ties rilaton inter la objektiva kaj la subjektiva mensoj. Kiel regi vian propran vivon, kaj sekve vian destinon, estas la celo de Mensa Scienco.

*Havebla de la Libroservo de UEA, prezo 21 gld., aŭ de la tradukinto/eldoninto Elwyn C. Pollock, P.O. Box 732, Morongo Valley, CA 92256, Usono, prezo US\$7.*

## **Fokuso**

**Kvaronjara  
popularscienca  
magazino**

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm  
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

**SENPAGA PROVEKZEMPLERO:**  
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368  
Budapest, Hungario

# **HEROLDO**

## **DE ESPERANTO**

**LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO**

**De 66 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo**

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,85 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska